8-a JARO, N-o 393



LEIPZIG, 8. / 9. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

ANTAŬEN!

Okaze de nia XII-a Kongreso, la eldonintoj de „I-sto“ streĉis ĉiujn fortojn k sukcesis, ja! aperigi dekpaĝan n-ron, anstataŭ la kutima kvar- aŭ sespaĝa. Estante tre fieraj pro tia sukceso, ili sendis el Berlino al Ŝtutgarto unu kolportiston por disvendi tiun eksterordinaran n-ron inter la kongresantoj. La unuan tagon de mia alveno tiu sendito provis, sed sensukcese, vendi al mi unu ekz-on. Li asertis, ke estas en ĝi multo, kio interesas mian personon. Mi tamen ne cedis. Tial, pro speciala favoro sendube, la kolportisto donacis al mi la multvaloran ekz-on. Mi do havis la senpagan plezuron legi, krom la kutimaj insultoj, ke la XII-a Kongreso de SAT estos la plej evidenta pruvo pri ĝia morto, pri ĝia definitiva disfalo ...

Nu, verdire, mi rilatis al la afero sufiĉe pesimiste. Tio ne signifis, ke mi kredis je la „disfalo“ de nia Asocio; sed konsidere al la nunaj tre malbonaj cirkonstancoj, mi antaŭdiris, ke ni estos en Ŝtutgart nur proksimume 150 K-doj k ke ne aliĝos entute pli ol 200.

La motivoj por esti pesimista ne mankis: skismo, senlaboreco, faŝistaj atencoj tra tuta Germanio... Kaj malgraŭ ĉio nia XII-a estis plensukcesa. Ne nur pro tio, ke venis 245 Gek-doj k ke 311 aliĝis, sed ankaŭ pro la fruktodonaj laborkunsidoj, dum kiuj en paco k trankvilo ni povis solvi kelkajn tre gravajn organizajn demandojn. Preskaŭ ĉiuj proponoj k decidoj estas akceptataj unuanime. Tio plej bone pruvas, ke nia movado retrovis sian spiritan ekvilibron k ke ĝi rekomencos sian iradon antaŭen, tuj kiam estos ŝtopita la breĉo farita en nia buĝeto per la rabo de la malhonestuloj el la C.K. de SEU.

Se la Kongreso per si mem estis plensukcesa, la tri propagandkunvenoj, kiujn organizis la K-doj el Ŝtutgarto, ankaŭ tre bone pruvis, ke nia movado havas simpation en laboristaj rondoj. Trifoje la granda salono de la „Wulle-Bräu“ estis plenigata per esperantema publiko. Sendube niaj K-doj, kiuj tiel sukcese organizis la Kongreson, faros bonan rikolton el la esperanto-semoj abunde dissemitaj dum tuta semajno.



La kongresantoj antaŭ la Ŝtutgarta teatro.
La polico de l'„mizerdekreta“ registaro malpermesis kunporti standardojn k afiŝojn

La Hitleranoj lasis nin labori tute trankvile, kvankam la Kongreso okazis sub la signo de batalo kontraŭ la faŝismon. Tion ja atestis granda ruĝa banderolo etendita fronte en la kongresejo k ankaŭ la decido partopreni al manifestacio, organizita en la tombejo, okaze de la cindrigo al komunisto, murdita de faŝistoj.

Kredeble la kolportisto, pri kiu mi parolis pli supre, havis ankaŭ la taskon observi k raporti al siaj sendintoj. Ni ĉiuj rilatis al li tre tolereme; li povis ĉeesti ĉiujn kunsidojn, rigardi ĉie k aŭskulti ĉion; li eĉ povis paroladi k fari demandojn. Ni tamen ne esperas, ke li raportos objektive; tian kapablon li ja ne havas: nur la papagan li lernis... „I-sto“ povos ankoraŭ paroli pri la „disfalo de SAT“, pri ĝia „kontraŭrevolucieco“ ktp.; tio ne gravas. Dume ĉiuj Gek-doj reveturis hejmen kun la firma konvinko, ke nia Asocio estas vivoplena k nedetruebla — nek per rabo, nek per kalumnio ...

Ekzistas jam sufiĉe forta kerno el K-doj, kiuj ĝuste komprenas la signifon de esperanto k la rolon, kiun povas k sekve devas ludi esperanta organizo. Kaj tiun kernon konsistigas elementoj el ĉiuj tendencoj, ne esceptante la bolŝevikan. Tiuj K-doj scias tre bone, ke la instrukcioj donitaj de Komintern pri „bolŝevikigo“ al la kulturorganizoj neniel povas rilati al nia mizera esperanta movado, ĉar ĝi ne estas — k bedaŭrinde ne baldaŭ estos — amasmovado.

La fondintoj de SAT povos sendanĝere en ne tre malproksima estonto transdoni ties gvidadon en aliajn manojn k ĝui iom da ripozo. La SAT-anoj jam nun konas la ĝustan vojon. Tion klare montris la XII-a Kongreso.

Antaŭen! ...

E. L.

En okazo de nova mondmilito

Aviadilo kontraŭ urbego.

La milito komenciĝus abrupte, en la momento, kiam la internacia situacio ne antaŭvidigus ĝin. Antaŭ ol ĝi estus oficiala, jam, el multaj aerodromoj, eskadroj da potencaj flugmaŝinoj, plenŝarĝitaj per pafaĵoj, ekdirektus sin al la limo. Flugante je 250 kilometroj hore, ili atingus rapide la ĉefurbon de l'celata lando, kies loĝantaro, ankoraŭ sub la frapo de l'emocio, ne pensus al tiel subita bombardo.

Semante la teruron, mortigante virinojn, maljunulojn k infanojn, detruante fabrikojn, elektrajn centrojn, fervojojn, aerodromojn, nenion lasante sur sia trapaso, la atakantoj ne nur portus fatalan puŝon kontraŭ la moralo de l'loĝantaro, sed ili malebligus ĉian mobilizadon.

Ĉefurbo k grandurboj estus transformataj, dum la spaco de unu nokto, en gigantajn ardaĵojn, en naŭzajn kadavrejojn. Neniu havus la tempon forkuri por trovi rifuĝejon. La ministrejoj, la monumentoj estus neniigitaj.

Unusola hodiaŭa aviadilo farus pli da domaĝoj ol cent Gota-oj[1] de 1918. La pafaĵoj estus multe pli malpezaj k samtempe multe pli efikaj. Oni aplikus brulig-bombojn en elektrono, pezantajn maksimume unu kilogramon k entenantajn varmegiĝan ŝarĝon k almiksaĵon el magnezio.

Tiuj ĉi iloj trapasus la tegmentojn de l'domoj k atingus la keletaĝojn. La modernaj konstruoj, faritaj el ferfadenoj, el kavigitaj brikoj k cemento, disfalegus kiel elkartaj kasteloj. La bomboj, eligante varmegon de pli ol 3000 gradoj k bruligante ne nur sian ŝarĝon, sed ankoraŭ sian elektronan kovraĵon, estus tiom pli teruraj, ke estis maleble ĝis nun trovi la rimedon por ilin estingi.

La akvo nur stimulas ilian povon.

Ĉiu aviadilo povus kunporti milon. Eskadro el 50 aviadiloj disponus pri 50 mil k estas verŝajne, ke por ataki ĉefurbon laŭ decida maniero, dum la unua nokto, la kontraŭulo sendus 100 aviadilojn, portantaj 100 mil elektronajn bombojn. Tiel, supozante, ke la duono nur atingas surkonstruitajn areojn, 25 mil almenaŭ, k sendube 50 mil brulegoj estus ekflamigataj.

La obusoj renkontus kunlaborantojn surloke: la gaskondukiloj krevus, la fontoj de akvo- k lumproduktado estus neniigitaj. La celata urbo estus transformita en oceanon el flamoj, k kiuj rifuĝus en ŝirmejojn, trovus tie abomenan morton.

Tio ne estus la fino: post la atako per brulbomboj, la kontraŭulo procedus al dua atako. Ĉi-foje, per aviadila eskadro ĵetanta asfiksiajn gasojn sub la formo de densigitaĵoj mortigaj, specoj de oblatoj kunmetitaj el plumba tetraetilo k telura dietilo, centfoje pli intensaj k donantaj la samajn simptomojn kiel la striknino. Alia gaso, inventita de la angla majoro Naj (Nye), havus tian efikon, ke sufiĉus unu ero sur dek milionoj da eroj da aero, por venki homon dum malpli ol unu minuto: tiuj, kiuj ne estus mortigitaj, fariĝus rabie frenezaj. Laŭ la inventinto, urbo de la amplekso de Londono, per milo el tiuj ĉi pafaĵoj estus trafita ĝis en siajn plej kaŝitajn anguletojn, k unu aviadilo sufiĉus por tiu agado.

Aliaj gasoj? La fosgeno, el kiu du tunoj povus neniigi urbon de 400 mil loĝantoj; la kakodil-izocianato mortiganta ĉiun estaĵon, kiu ĝin enspirus; la blindekso blindiganta momente; iu miksaĵo, kiu gasumante difektegas la nutraĵojn, k malebligas helpi la postvivantojn k enterigi la kadavrojn. Kaj kiom da aliaj, ĉar kun la miksaĵoj oni povas imagi nekredeblan nombron da procedoj por la vica mortado, kontraŭ kiujn la plej hermetikaj maskoj montriĝus senpovaj!

Bruligitaj aŭ gasumitaj, tia estus la sorto de ĉiuj atakataj urboj k iliaj loĝantoj. Ruino, malsato, epidemio, jen la rezulto de l'unua militnokto.

Per la rimedoj, pri kiuj oni nuntempe disponas, oni povas kompreni, kiel procedus la atakantoj; el subterejo betonita, situita je pli ol mil kilometroj da distanco de la celo, radiotelegrafistoj en kunligo kun sia kolego, kiu estus sur ĉiu aviadilo, indikus la ekzaktan punkton, super kiu manovrus la flugantaro k kiun ĉi tiuj ne vidus. La mano de l'bombardado troviĝus sur la urbo, la cerbo k la okuloj estus je granda distanco. Per la nokto, la nebulo, super nuboj, la buĉado efektiviĝus kun la maksimuma precizo. Tion jam nun permesas atingi la radiogoniometrio.

La telemeĥaniko kompletigus tiun ĉi laboron: aviadiloj senpilotaj, specoj de flugilhavaj gondoloj, estus gvidataj de inĝenieroj, kiuj, same, je pli ol mil kilometroj de la loko senpardone kondamnita, funkciigus turniletojn sur vasta tabulo k kondukus la eskadrojn, faligante la ŝarĝon laŭ sia plaĉo.

Aviadiloj kunportus en sia fluglinio malgrandajn flugmaŝinojn, al kiuj ili estus ligitaj per kabloj. Ĉu punkto detruenda estus surflugata? Aŭtomata ekfunkciigo liberigus unu el tiuj ĉi flugmaŝinoj de supraĵa k malmultekosta strukturo: ĉi tiu deĵetus bombojn dum la falo k liverus al la flamoj tutan kvartalon.

Aldonu ni al tiuj ĉi teruraj perspektivoj la laboron de l'ofer-kompanioj, moderna formo de l'specialaj misioj en la lasta milito: pluraj aerobusoj transportus centon da soldatoj ekipitaj per maŝinpafiloj, k metus teren ilin ĉe la enirejo al urbo. La trupo eksplodigus la artverkojn, mortigus la civilulojn k, seminte la teruron, reforirus sen la plej malgrava konfuzo.

Laŭ Jak. Mortan (Mortane) en „Sindikatismo".

[1] Flugmaŝina modelo. — *Red.*

Atentigo

Dum aŭgusto k septembro K-do Lanti vojaĝe libertempas k sekve ne povas akurate respondi leterojn al li adresitajn. Nur en oktobro li povos denove plenumi normale sian SAT-taskon.

Por ŝtopi la breĉon

16. listo.

	H. D.	dol. 3.–
10341	K-do Kaiser (Paris)	fr. fr. 10.–
17228	K-do Chavenon (Clermont)	fr. fr. 4.60
	Kelkaj sovetianoj	fr. fr. 240.–

Polio en la krizo

En diversaj distriktoj bienuloj ŝuldas al terlaboristoj salajron de 8–9 monatoj. En kelkaj regionoj de l'Varsovia distrikto tiukaŭze komenciĝis strikoj. Terlaboristan strikon dum rikoltoperiodo oni speciale timas.

La mizero, la tre granda kreskado de l'loĝantaro ĉiam estis tre grava instigilo al elmigrado, kiu permesas forkonduki la superfluan loĝantaran kvanton. Sed nun preskaŭ ĉiuj elmigraj landoj fermis siajn limojn k tio ne nur kaŭzis preskaŭ kompletan nuligon de l'elmigrado, sed eĉ enmigran pliiĝon. En la monato majo 1932 elmigris el tuta Polio 3 056 personoj, enmigris 3 631. La transmara elmigro perdis sian tutan signifon k montris en majo jenajn nombrojn: 645 elmigrintaj, 650 enmigrintaj personoj.

La eksporto de polia karbo konstante falas. Je 1. 5. 1931 la karbeksporto sumiĝis je 5 039 180 tunoj en valoro de 129 532 000 zlotoj; je 1-a de

Daŭrigo pĝ. 236, post la protokolaro.

ĈIUJN

de vi bezonatajn esperantaĵojn, el kiu ajn eldonejo (librojn, broŝurojn, lernilojn ktp) vi povas mendi ĉe la

ADMINISTRACIO DE SAT,
Kolmstrasse 1, Leipzig O. 27.

Notu bone tion en la memoron k neniam forgesu, ke aĉetante ekskluzive ĉe SAT vi tre efike helpas al ĝi por „ŝtopi la breĉon"!

la plej taŭga, ĉefe en nia Asocio, kies membroj havas unu solan lingvon. Certe en aliaj asocioj la sistemo renkontus malhelpojn, ĉar ekzistas doganbaroj k limoj – la plej grava limo ja estas la lingva limo. Kompreneble ankaŭ ni povus fari rasojn el nia granda popolo esperantista de l'mondo. Ankaŭ la lab. esp-istoj povus dividi sian movadon laŭ naciecaj konsideroj: ni havus internacian, anstataŭ esp-istan kongreson. Per tiu sistemo tiam ni alpaŝus al la naciismo. La granda intereso, kiun ni havas je SAT, estas, ke ĝi servas por sennaciigi la K-dojn, k se morgaŭ vi volas organizi SAT per delegitoj, vi havos Int-on el naciecoj; estos proponoj germana, aŭstra, franca ktp. Jen ekestos la naciecaj interpuŝoj en nia Asocio, kiu fariĝos bona bazo, por ke la naciistoj povu fari sian fian laboron. Nun, post la morala vidpunkto ankaŭ la materiajn interesojn ni konsideru. Oni parolis pri malfaciloj de l'du-organiza sistemo. Certe ili ekzistas. Sed ĉu ni esp-istoj kulpas pri tio, ke ni devas elĉerpi niajn membrojn en la nacilingvularo? Ni devas kalkuli pri la ekzisto de l'naciaj lingvoj. Tial LEA estas necesega por propagandi esp-on. Sed ĉu tiu bezono pri la LEA estos konstanta? Memevidente ne. Kiam esp-o estos sufiĉe disvastigita, por ke oni ne plu bezonu propagandi ĝin, kiam ĉiuj havos la bezonon mem lerni la lingvon, tiam la LEA-oj ne plu havos ekzistorajton. Tiam ni povos pensi pri ilia malapero. Ni devas havi pli intimajn rilatojn inter LEA k SAT, en tiu senco, ke SAT kvazaŭ formanĝu la LEA. Por organizi novajn esp-istojn, estas tre malfavore pagigi al ili altajn sumojn (la kotizon por SAT k LEA kune). Se la prezo por „S-ulo" ne estas malpli alta, tio dependas unue de la malgranda abonantaro: pri tio 1) kulpas la krizo; 2) la skismo, kiu rabis de ni grandan nombron da anoj. En tio ne kulpas la SAT-anaro, sed kelkaj fiuloj, kiuj venis en nian movadon por fie agadi. Oni proponis unusolan kotizon en iu Int-o. Kiel prezentiĝus do la nova kotizo? La nuntempa aktiva SAT-kotizo por Francio estas 40 frankoj jare; la LEA-kotizo 12 frk. jare. La preskostoj por 10 000 ekz-oj de „S-ulo" (laŭ statistiko de fakulo) relative ne grave malaltiĝus proporcie je presado de 1000, 2000 aŭ 3000 ekz-oj. Sekve la abonprezo ankaŭ ne povus tiom grave influiĝi. Estas krome administraj elspezoj, k ankaŭ restas la elspezoj por la propagando. Malfacilaj varbebloj rezultus ĉe kotizo, kiu devige restus sufiĉe alta. Mi vidas la solan solvon en tio, ke lernanto unue devas helpi al la *propagando* (komence aliĝante nur al sia LEA). Nur poste, – k malmultaj alvenas al tiu punkto – ili fariĝos scipovantoj de la lingvo k emaj legi literaturon esp-lingvan. Dum tiu periodo okazas la selektado. Kaj tial la tutmonda socio ne povas havi tiel grandan anaron. Ne povas esti kiu ajn en tiu org-o. Ĝi ne estas komparebla kun sindikato, kie sufiĉas pagi la kotizon. Oni devas lerni multajn monatojn por esti vera esp-isto. Sed ĉefa motivo pri malmultiĝo de l'anoj estas la krizo, kiu forŝtelas la monon el la lab. monujoj, k kun tio ... la fratbatalo. La prop. 13 ne plibonigus la nunan staton, sed kreus la staton de hieraŭ rilate la K-dojn bolŝevikajn, – k tio nur naŭzas novajn K-dojn.

K-do *Fen* (Veen): La landaj org-oj devas labori k laboras fakte por la disvastigo k oficiala akceptigo de esp-o, ĝia enkonduko en la lernejoj, ĝia apliko ĉe la diversaj sindikatoj. Kiam ni estos sukcesintaj en tio, tiam okazos, ke tiuj landaj org-oj malaperos, ne plu necesas, ke ili restas SAT. Do kiam SAT konsistas el landaj asocioj, k ĉi lastaj malaperos, SAT ankaŭ malaperos. Dekiam mi estas SAT-ano, mi sentas veni ion novan; kelkfoje mi sentas doloron, aŭskultante al la diversaj paroladoj. En nia unua Statut-paragrafo tekstas ja: „(ni) estu komprenemaj k toleremaj rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemoj ...", kun la signifo, ke ni per interkomprenîĝo pri la diversaj tendencoj alvenu al la tutmonda laboristaro. Mi konstatis, ke SAT havas alian celon ol la Int-oj. Ĝi devas havi k havas celon, kiu superas la ideon de Int-o. Se SAT fariĝus Int-o, k restus Int-o, ĝi fariĝus konkuranto al la aliaj Int-oj. Tion ni ne volas. La prop. 13 trudas al ni formon, kiun ni ne deziras. Tial mi ĝin nepre kontraŭas. Por ni la Jarlibro estas tre valora; la esp-istoj trovas en ĝi la mondideon, kiun ili deziras trovi en nia komuna lingvo. Se ni forigus la Jarlibron, la anoj ne plu sentus la ligon kun la alilandaj K-doj.

K-dino *Falkenher:* Iuj intencas aliigi la strukturon de SAT; oni legu atente la prop. 13 k jen kion skribas „La Socialisto" en alvoko al la nuna SAT-Kgr.: „Dum tempo de plej grava ekonomia krizo k senlaboreco vi membroj de SAT alvenas al via 12-a Kgr. Grava estas ĉi tiu Kgr. SAT liberiĝis el la skismuloj. Ĝi permesis ne fariĝi *komunista filio* ... La Kgr. ... devas fari tujajn decidojn, kiuj estas necesaj por bona k daŭra funkcio de la org-a aparato. Ni esperas, ke bone solvos ĉiujn aferojn la Kgr. ..." Oni esprimas, ke ni ne akceptu la komunistojn. Kion do faru la K-doj apartenantaj al S.A.P. (Socialista Lab. Partio Germ.), kiuj lastbalote voĉdonis por kompartio anstataŭ por la II. Int-o? Mi ne kredas tiun prop. fruktodona por nia org-o. Restigu la strukturon de SAT, kia ĝi estas. Ni laboru por ĝi laŭ niaj fortoj!

(Daŭrigo k fino en la venonta n-o.)

La dumonata, bele ilustrita, grandformata literatur-scienca revuo de SAT (min. 20-paĝa)

LA NOVA EPOKO

estas ankaŭ aparte abonebla k kostas nur 2.50 mk. g. *(15 fr. fr. aŭ ekvivalento) por tuta jaro (6 kajeroj).*

Ĝi estas la plej malkara tiuspeca eldonaĵo esperant-lingva kun bela, vere leginda enhavo.

La 3 jam aperintajn kajerojn de la nova jarkolekto vi povas ankoraŭ ricevi por 1.25 mk.g.

PROTOKOLARO PRI LA XII-a KONGRESO DE S.A.T. EN ŜTUTGART.

6. – 11. aŭgusto 1932.

Mallongigoj uzataj en tiu ĉi raporto.

esp., esp-o = esperanta, esperanto.
GLEA = Laborista Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj.
Int-o = Internacio.
Kgr. = Kongreso.
lab. = laborista.
LEA = Laborista Esperanto-Asocio.
O.K.K. = Organiza Kongres-Komitato.
P.K. = Plenum-Komitato.
org-o = organizo.
prop. = propono.
SEA = Socialista Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj.
„S-ulo" = Sennaciulo.

La Kongreson antaŭis jenaj aranĝoj, kiuj okazis same kiel la laborkunsidoj en la vasta salono de la konstruo Vule (Wulle), Nekarstrato en Ŝtutgart.

1. Sabaton, la 6-an de aŭg., *varbvespero*, kiun ĉeestis proks. 900 personoj, kun muzikprezentoj de l'lab. akordion-klubo (1901), salutparoloj de K-do *Dojbler* (München) k germanlingva propagand-parolado de rusa profesoro el Hejdelbergo, d-ro Sergej *Ĉaĥotin*, kiu pritraktis dum duona horo la signifon de esp-o k ĝian neceson por la laboristaro. Krome salutparolis K-doj *Azorin* (Hispanio), *Ozere* (Francio), *Vesels* (Holando), *Johanson* (Stokholmo), *Dann* (Usono), *Benaim* (Norda Afriko), *Ŝvajghart* (Aŭstrio), kies paroloj estis tradukataj por la neesperantista publiko.

2. Dimanĉon, la 7-an de aŭg., *publika salutvespero*, kiun ĉeestis 900 personoj. Post enkonduko de K-do *v. d. Heid* k muzikludo de l'Ŝtutgarta filharmonia orkestro, ĥorparolis SAT-junularo komune kun la Nekargartaĥa *infangrupo;* ĥorkantis la „Internacion" esp-e naturamikoj (multvoĉa ĥoro), k poste salutis reprezentantoj de germanaj k alilandaj lab. organizoj. Nome: K-do *Azorin* por la Hispana Socialista Partio (kiu jam favore esprimis sin por esp-o), K-do *Grime* (Vieno) por ALLE[1], K-do *Fen* (Veen) por N.F.L.E.,[2] K-do *Johanson* por sveda LEA, sveda soc. dem. partio k precipe A.B.F. (Laborista Kleriga Asocio); K-do *Kotz* por la ĉeĥoslovakiaj Gekdoj, precipe tiuj el Plzen; K-do *Rauh* por la Ŝtutgarta metallab. sindikato; K-do *Traubmann* por la loka naturamika sekcio; K-do *Just* por lab. naĝunuiĝo (li parolis provoke en la senco de l'opoziciuloj; incidento estis evitita nur dank' al la disciplino de l'kongresanoj). K-doj *Vogel* por Marks-Lenina labor-lernejo; *Sicker* por Germana Liberpensula Unuiĝo; *Müller* por Germ. Lab. Abstinencula Asocio; *Härle* por magistrata frakcio de l'SPD (soc. dem. partio); *Ŝrajber* por la magistrata frakcio de la KPD (kom. partio). Sekvis 12-jara K-deto *Vajnberg* el fervojista grupo de Frankfurt-Nied, kies kelkminuta klara k flua esp. parolado rikoltis plej grandan aplaŭdon. Poste parolis en esp-o K-do *Martini* por Ruĝa Helpo, la opoziciulo Ŝvarc, redaktoro de „Arbeiter-Esperantist", por Orient-Ŝtutgarta kompartio, *Hamer* por komunista opozicio, *Bötzer* por Libera Lab. Unio, K-dino *Falkenherr* por Komuneco de prol. liberpensuloj germaniaj, K-do *Vesels* por Internacia Antimilitista Oficejo, Harlemo, K-do *Valdman (Bremen)* por ISK, la estro de SEA K-do *Puf* por la nomita organizo k K-do *Bieg* por la Militkontraŭula k Militviktima Asocio.

Poste K-do *Lanti* en konciza parolado respondis al la provoj de la opoziciuloj ĉeestantaj sub gvido de Ŝvarc-Berlin, miskreditigi SAT-on, precipe per la aserto, ke ĝi estas „por-imperiisma", sekve kontraŭrevolucia organizo ... sur la bazo de ekster la kunteksto prezentitaj frazoj el la broŝuro „La Lab. Esperantismo". Li klarigas, ke la nun tiom riproĉata paragrafo de la SAT-statuto estis akceptita en 1928 kun la aprobo de la Sovetiaj K-doj. Li profitas la okazon por sendi al ili sian fratecan saluton trans la kapoj de la nuna C.K. de SEU. Li diris, ke oni ne estas revoluciulo pro la sola kaŭzo, ke oni loĝas en Moskvo, kiel loĝado en Parizo ja ne pruvas kontraŭrevoluciecan spiritostaton de iu persono. Li akcentas, ke la sennaciismo ne havas pli da rajtoj en SAT ol aliaj lab. klasbatalaj tendencoj. La SAT-anoj kontraŭbatalas la kapitalismon; ĉi tiu estas en nia epoko neeviteble imperiisma: konsekvence ankaŭ la imperiismon ni kontraŭbatalas. Ĉio alia estas kalumnioj. Li akcentas, ke ondo da naciismo jam multloke minacas superakvigi la klasbatalan movadon k ke tio instruas al klarviduloj pri la nepra neceso kontraŭbatali ĉion naciecan. Fine li alvokas al tutproletara unuiĝo por kontraŭstari la faŝistan minacon. –

[1] Aŭstria LEA.
[2] Nederlanda LEA.

Post tiuj vortoj ni aŭdis belan parolĥoron kun orkestra k kanta muziko: „La Maŝino“, prezentita de Ŝtutgartaj lab. naturamikoj.

En la kongresejo oni rimarkis poŝtmarkan aĉetejon, leterkeston, belegan dokumentoriĉan ekspozicion aranĝitan de la esperantistoj komune kun fotosekcio de l'naturamikoj k lab. abstinenculoj, krome librovendejon.

Unua laborkunsido: 8-a de aŭgusto, 9,30 horo.

K-do *Ulo* (Ŝtutgart) *enkonduk-parolas por la O.K.K.:* En malfacilaj cirkonstancoj, situacio de faŝista teroro en Germanio, ni transprenis la taskon organizi la Kgr.; pro personaj kaŭzoj mi devis rezigni *publike* paroli en la salutvespero; anstataŭis min kun aprobo de ĉiuj O.K.K.-anoj K-do *v. d. Heid.* Malgraŭ skismo k ĉiamaj provokoj ni havis la volon kunhelpi, por ke proletaj esp-istoj ekkonu, ke SAT vivas k funkcias. La polico malhelpis dekomence k malfaciligis nian laboron. Kelkaj LEA-anoj ankaŭ klopodis miskreditigi nin ĉe la revolucia laboristaro ĉi tie. Ili disvastigis famon, kvazaŭ ni denuncis ĉe la polico la lokan LEA-grupon, tiel ke ĝi ne plu ricevas lernejan ĉambron por kursoj. Ili presigis kalumniojn en loka kompartia gazeto. Nian Kgr. oni nomis en „Internaciisto“ „demonstre de findegenero aŭ eble eĉ enterigo de proletojn trompanta aventurista SAT-entrepreno.“ (!!)

Ni petas pardonon, se estas iuj mankoj en la kongres-aranĝoj. Ni zorgis pri en nuna mizero malfacile troveblaj senpagaj privatloĝejoj, senkosta amasloĝejo en *Arbarhejmo Heslaĥ* kun eblo starigi tendojn. La urbadministracio donacis 150 mk. g., la urba trafikkomitato kelkcentojn da gvidlibroj. Vizito al kelkaj urbaj entreprenoj estas senpaga.

Mi ne volas prisilenti la naciisman ondon, kiu eĉ influis la proletajn cerbojn. Mankas ankoraŭ vera internacia lab. solidaro. Tial ni devas flegi sennaciecon, ne detrui la nunan SAT-strukturon. Ni ne imitu la erarojn de l'LEA-anoj el Germanio.

La O.K.K. ne povis en „S-ulo“ regule komuniki pri la politika situacio en Germanio. Ni mem ĝis antaŭ kelkaj tagoj ankoraŭ ne sciis, ĉu niaj publikaj aranĝoj povos okazi. Aliĝis ĝis ĉi tiu tago 294 Gek-doj el 14 landoj al la Kgr. (La definitivaj nombroj estas jenaj: Aliĝis 311 Gek-doj, nome el Afriko 1, Aŭstrio 7, Belgio 1, Britio 5, Ĉeĥoslov. 1, Francio 23, Germanio 177, Hispanio 2, Nederlando 81, Norvegio 2, Portugalio 1, Svedio 4, Svisio 3, Usono 3. El tiuj aliĝintoj partoprenis efektive la Kgr. 245 Gek-doj el 12 landoj, nome el Afriko 1, Aŭstrio 6, Belgio 1, Britio 1, Ĉeĥosl. 1, Francio 11, Germanio 156, Hispanio 1, Nederlando 61, Svedio 4, Svisio 1, Usono 1.)

Multnombrajn salut-telegramojn k -leterojn ni ricevis, i. a. de Sindikatara Internacio, Berlin; Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esp-istaj; Socialista Lab. Partio (SAPD), Virtemberga distrikto; Transportlab. Internacio, ankaŭ ĝia esp-a fako; Intern. Esp. Muzeo; Saksaj esp. geinstruistoj; Intern. Labor-Oficejo; Kontraŭmilitista Internacio; SAT-anoj el Plzen, Valencia, Dresdeno, Malmö, Lozano, Oslo, k. m. a.

K-do *Lanti*, prezid. de la Plenum-Komitato, dankinte al la O.K.K. pro la organizado de tiu bela k sukcesa Kgr. en tute nefavoraj cirkonstancoj proponas kiel prezid. de la Kgr. K-dojn *Dojbler* (München), *Johanson* (Stokholmo), *Fen* (Ven) (Amsterdam) *(Unuanime akceptitaj de la Kgr.);* kiel protokolantojn K-dojn *Bartelmes* (Parizo), ĉefprotokolanto, *Pakje* (Parizo) k *Time* (Lajpcig), helpantoj. (*Unuanime akceptitaj.*) Kiel anojn de la Propon-Komisiono K-dojn *Valdman* (Bremen), *Falkenher* (Dortmund), *Zelnikov* (Boĥum), *Vesels* (Amsterdam), *Vetig* (Gelnhausen), *Heuschen* (Verviers). (*Unuanime akceptitaj.*) Li plue proponas, ke la reprezentantoj de la LEA aliĝu al tiu Komisiono por ke ili konigu sian opinion pri la punktoj en la projekto de nova statuto, kiuj rilatas al la rilatoj inter SAT k la LEA. (Unuanime akceptita).

K-do *Dojbler* (prezidas): Ekzistas membroj, kiuj venante al la Kgr., ne volas pagi sian kongreskotizon. Ĉu tiuj SAT-anoj havu samajn rajtojn kiel tiuj, kiuj pagis la kongresaliĝon?

K-do *Grim* (Ŝtutg.): Mi estas ano de SAT, sed ne *volas* pagi la kongresaliĝon, ne bezonante la servojn de l'O.K.K. Nenio estas en la statuto, ke SAT-anoj ne rajtas partopreni diskutojn. Nur ĉar mi estas komunisto, oni volas min forigi.

K-do *Ulo:* Grim estas tiu sama K-do, kiu volis malebligi, ke la akordion-klubo ludu ĉe nia varbvespero. Estas li, kiu planis kun lokaj LEA-anoj *„krevigi“* nian Kgr.

K-do *Zehrer* (Chemnitz): Mi protestas je la nomo de la senlaboruloj, kiuj post longa ŝparado k penado sukcesis veni al Ŝtutgart k *pagis la kongreskotizon.* K-do *Vesels* same; avertas kontraŭ la malfidinda taktiko de la bolŝevikoj.

Unuanima decido de l'Kgr., ke Grim devas pagi la aliĝon, se li volas ĝui la rajton de aktiva SAT-ano ĉe la Kgr.

La Protokolaroj broŝure eldonitaj

pri la X-a SAT-Kongreso en Londono k la XI-a en Amsterdamo estas gravaj helpiloj por kompreni la okazintaĵojn en la SAT-movado. Havigu ilin al vi, pagante *nur po 0.20 M.* al la *Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O. 27.*

K-do *Vesels:* La *principo* por mi estas pli grava ol la praktikaj aferoj de la prop. 13. Tiu prop. certe enhavas, ke ni forlasu la nunan strukturon de SAT, por fari el ĝi Int-on. Se ni akceptus tiun prop., tio signifus, ke SAT ne plu ekzistas, sed nova esp-ista Int-o, k el tio sekvus, ke sufiĉa nombro da SAT-anoj eksiĝus el tiu org-o. La proponintoj kredeble ne komprenas tion (ili ja eble ne volas fari malbonan laboron), sed ili devas kompreni, ke alitendencanoj ne povas akcepti la prop., kontraŭ kiun cetere la movado estas sufiĉe grava. K-dino Klatil k ankaŭ la aŭstriaj K-doj parolas pri kotizo por LEA k SAT, sed ne diras, kiel altaj devus esti la kotizoj; certe alta kotizo prezentus gravan baron. Landasocioj k SAT havas tute alian starpunkton malgraŭ interrilatoj de ambaŭ aparatoj. La poresp-aj LEA-oj nur propagandas k instruas esp-on, — ekz. la holanda LEA ne faras peresp-an laboron, nur propagandas k *bone* propagandas. Sed tiu tasko ne estas por grandparte peresp-a org-o SAT. Ĉe kuniĝo de LEA k SAT, unu el ili devas ŝanĝi sian starpunkton. Kio rilatas la neeldonon de l'Jarlibro (vd. prop. 13, alineo d), — se tiu adresaro eble por la aŭstriaj Gek-doj ne havas valoron, male por mi k aliaj ĝi havas treegan valoron. Ĝi absolute ordigas la rilatojn inter la SAT-anoj. Pri la frazo: „Ke la nuna stato ne estas kontentiga, pruvas la fakto, ke SAT nur havas proks. 2000 membrojn en tutmondo ...", — vi devas bone kompreni la cirkonstancojn. Kune foriĝis el SAT la Sovetiaj K-doj, kiuj siatempe ofte po cento aliĝis k kreskigis la membronombron de SAT; sed ne ĉiam estis valoraj anoj. Ne la granda nombro difinas la valoron de org-o. Mi preferas asocion el 2000 kapablaj anoj al org-o el 10 000 membroj, kiuj ne laboras k nur pagas kotizojn, k nur la gvidistoj faras la laboron por ili. La socialistoj ĉiam volas havi la surpaperajn *amasojn.* Ni momente havas 2000 anojn; ĉu tiu nombro ne sufiĉas? Ni propagandu bone inter la esp-istoj por SAT. La forto ne kuŝas en amasmovado (Intervoko: Do eksigu la socialistojn!) Mi tute ne ofendas la socialistojn. — La SAT-Kgr. nepre malakceptu prop. 13, ĉar akcepto signifus la finon de SAT.

K-do *Johanson (legas la unuan paragrafon de l'Statuto).* Tiuj vortoj diras ĉion, kion oni bezonas diri pri la prop. de l'aŭstriaj K-doj. Mi aldonas tamen pri alia org-o, kiu pruvas, ke estas eble kunigi ĉiujn anojn en unu org-on, k kie ili tamen povas defendi sian politikan tendencon: A.B.F. (Lab. Kleriga Asocio) en Svedio entenas depost 1920 ne nur socialdemokratojn, sed ankaŭ ambaŭ bolŝevikajn partiojn k la junularojn. Ĝi konsistas el la fakaj societoj, kiuj pagas fiksitan sumon jare. Tie ne okazis dum multaj jaroj principaj diskutoj. Ĉiuj estis tute konvinkitaj pri la ĝusta gvido de A.B.F., kiu ricevas jare 72 000 kronojn per kolektiv-aliĝoj. SAT ne estas politika org-o. Ĝi nur celas klerigi nin per literaturaĵoj ktp. Mi estas kontraŭ la tuta propono.

K-do *Grime* (Vieno): Mi parolos nur pri prop. 13 (ne 12, kiun oni citis komence). En la tuta prop. nenio estas dirita pri faro de tendenca laboro, nenio pri socialista, anarkista, komunista laboroj. Temas nur pri praktikaj solvoj en ĝi. La subskribintoj starigis la prop. nur pro praktikaj spertoj. Ni spertis en Aŭstrio, ke ni bezonas bone organizitan tutmondan org-on, por vere efektive progresi — propagandi, disvastigi k uzi esp-on. La nuna formo sole ne plu taŭgas; nun ni devas fari paŝon antaŭen. Mi pledas por akcepto de la prop., kiu tute ne signifas jam ŝanĝon de SAT, sed nur proponas interrilati kun LEA-oj por veni al klara starpunkto. Pri sama temo oni ofte vidas aliel, ol estas efektive, k erare pensas. Ne temas pri kaŝa laboro, kiel dirite en prop. 12, sed nur pri plibonigo de la org. stato. Ĝi cetere iom similas al aliaj prop-oj al la Kgr., kiuj espereble trovos pli bonan akcepton k kiujn la Prop.-Komisiono malakceptis, antaŭ ol oni diskutis ĉi tie (prop. de SAT-anoj el Rejn-Majn-regiono pri komuna gazeto). La Jarlibra demando ne estas grava k pridiskutebla, ĉu ĝin eldoni kiel ĝis nun aŭ nur kun adresoj de perantoj k lokaj grupoj. Por ni ne sufiĉas org-o el 2000 membroj, kiel por la holanda K-do. Ni ne volas „paper"-amasojn, sed ni estas konvinkitaj, ke la movado venkos nur, se oni akiros paŝon post paŝo la *amason* k en ĝi ĉiun unuopan. Ni celu krei batalkapablan org-on tutmondan kiel tegment-org-on bazitan sur lokaj k landorg-aj grupoj, per kiu ni povos labori por nia celo: Per esp-o por Socialismo!

K-do *Ulo:* Mi persone absolute malaprobas la prop. 13, ĉar mi vidas en ĝi nur la unuan paŝon por transformi SAT en Int-on k poste fari el ĝi tute socialistan Int-on. La K-doj el Aŭstrio tre lerte esprimis la prop. 13. Ili ne skribis, ke ili volas fondi Int-on: Ili volas centrigon, sed tio estas la sama. Mi estas SEA-ano k bone povas diveni, ke temas ne nur pri transformo de SAT en Int-on, sed ankaŭ pri tendencigo ĝia. Mi ne kredas, ke la delegitsistemo estas pli demokrateca ol la nuna sistemo de SAT. Ĉi tie mi povas diri mian opinion, sed en iu grupo mi mem ne plu povos fari tion, mi ne plu povos viziti kongresojn. Ekz. la Naturamikoj tute ne interrilatas rekte kun siaj amikoj en eksterlando. Ili tute ne interesiĝas pri internaciaj aferoj. Ĉiam mi denove memorigas pri la nuna naciisma ondego tra la mondo. Kial do ni ĉiam denove starigu la landlimojn? Ni ne ĉiam imitaĉu malnovajn aferojn. Ĉu vi ne kredas, ke ni povas prepari la fundon, fine devas komenci krei ion novan? Ĉu ne estus malprogreso transformi SAT en Int-on? Ni volas esti la plej bonaj inter la revoluciuloj, do ni ne estu reakciaj! Ĉu vi volas grandan org-on, en kiu estas plej multaj membroj, sed kiuj ne scias esp-on, aŭ kapablulojn, kiuj volas servi al SAT k al la tutmonda proletaro?

K-do *Ozere* (Parizo): Ĉiuj org-oj havas la internaciecan org.-sistemon, nur SAT havas la novan, la sennaciecan, kiu laŭ mi estas

de „S-ulo“, en kiu aperis artikolo pri la Sovetia lernejo. Mi sendis ĝin kun granda letero. Sed li neniam ricevis tiun sendaĵon. — Laŭteorie SAT estas superpartieca. Sed praktiko estas ĉiam pli malfacila. Kiel redakti „S-ulo“n superpartiece? En „S-ulo“ aperis kelkaj artikoloj pri elektoj en Vieno k Prusio, kiuj vere ne estas bonaj artikoloj. La valoro de „S-ulo“ estas granda, se ni povos montri ke en ĝi estas pli bonaj informoj ol en la enlandaj gazetoj. Sed rilate tion ĉiam estas iuj mankoj en la redaktado de „S-ulo“.

K-do *Lanti:* La kritikoj ĝis nun faritaj estas tiom mildaj, ke fakte ne valoras nin defendi. Plejparte ili estas cetere tute ĝustaj. Ekz. K-do Aarse faris tute trafan rimarkon pri la enhavo de „S-ulo“. Sed kvankam mi konsentas, ni mem ne povas forigi la mankon. Se en iu regiono mankas sufiĉe sperta, kompetenta, objektive observanta K-do, ni ne povas dungi tian, pagi honorarion por lin trovi. Tial la disigo de niaj fortoj montriĝas pli riproĉinda. Ni ĉiam diris, ke la celo de SAT estas kleriga, informa, eduka. Tio povas okazi nur, se la SAT-anoj konscie celas al tio. Ili ja ne devas informi simple laŭ tio, kion ili legas en siaj ĉiutagaj nacilingvaj gazetoj. Mi tial ĉiam insistas pri la memeduka rolo. Oni povas konstati iujn progresojn. Estas kelkaj valoraj kunlaborantoj, k ili estas inter la plej modestaj K-doj. Por ne ofendi ilian modeston, mi citas neniun. Ni devas pligrandigi la nombron de tiuj objektive verkantaj K-doj. Sed tia tasko ne estas facila k ne tuj plenumebla. Pri la farita riproĉo — se oni povas nomi ĝin riproĉo — mi tute konsentas k promesas fari la gazeton *laŭeble* pli k pli fidinda. Ne necesas aldoni ion: la prezidantaro voĉdonigu pri akcepto aŭ malakcepto de la raportoj prezentitaj.

Per manlevo estas unuanime akceptataj la raportoj de l'P.K., same la financa raporto.

K-do *Dojbler* invitas la kongresantojn kolektiĝi la venontan tagon post la matena kunveno por, flankelasante partiecajn konsiderojn, komune marŝi al tombejo, kie okazos la cindrigo al viktimo de la faŝistoj (komunisto). — *Konsentite.*

K-do *Johanson* fermas, esprimante sian ĝojon pri la bonharmonia okazado de la kunsidoj, kontraste al la lastaj Kongresoj.

9-a de aŭgusto, 9,30 horo.

Tial ke la Propon-komisiono ne povis fini sian preparlaboron k ne estas preta por raporti, sub prezido de K-do *Fen* (Veen) okazas

lekcio de K-do F. Azorin (Cordoba)

pri la situacio en *Hispanio:* Post kelkaj etnografiaj klarigoj la oratoro pritraktas la politikan evoluon de l'lastaj jaroj, la unuajn paŝojn k agojn de l'respublika registaro, rilatojn de eklezio k ŝtato, forigon de troo da generaloj, problemon de l'terdisdivido. Perspektivoj de socialista aŭ anarkista revolucio en nuna tempo. Ribelprovoj en Katalunio. Malfaciloj pro manko de klerigitaj personoj. Kreo de novaj lernejoj. Ekzisto de laboreblоj. — La parolado estis varme aplaŭdata.

En la diskuto parolis K-doj *Vetig, Vesels, Zernikov* k *Švarc,* kiuj petis klarigojn pri bien-disdivido, sindikata movado, malpermeso de esp. instruado en iu loko, k la lasta (redaktoro de „Arb. Esp-ist“!) anoncis al ni kun la tono de pseŭdo-marksista d-ro la triumfon de l'sovetoj en Hispanio post tre baldaŭa estonto! ... K-do *Azorin* respondis mallonge al tiuj K-doj. —

Je la 11-a horo la kongresantoj iris komune al la tombejo „Pragfriedhof“ k ĉeestis kun granda SAT-standardo la cindrigan ceremonion por viktimo de l'faŝismo.

Tria laborkunsido: 9-a de aŭgusto, 20,30 horo.

Prezidas K-do *Dojbler.* K-do *Valdman* (Bremen) *por la Propon-Komisiono:* La Prop. Komisiono pritraktis kune la prop., kiuj temas pri statutŝanĝoj (2, 12, 13). K-do Dan el Usono k reprezentantoj el diversaj LEA-oj ankaŭ partoprenis la laboron de l'Komisiono. Ĉiuj havis sufiĉe da tempo por konigi al ni sian opinion pri la afero. (Legas prop. 13, p. 225 en „S-ulo“, k la 3-an parton de prop. 11 k prop. 12 [sama paĝo]). La Komisiono *unuanime* malakceptis la 13-an prop. de l'aŭstriaj Gek-doj, pro tio ke la Kom. kredas, ke se ni farus el la SAT-movado kuniĝon el diversaj LEA-oj k tiel farus el SAT Int-on, tiam la ĉefideo de SAT, nome la sennacieca ideo, ne plu restus. Ni jam nun kelkfoje aŭdis; estas K-do el Nederlando, estas K-do el Aŭstrio, — k tiam certe estonte ĉiam en la Kgr. ni diros: la aŭstriaj K-doj opinias tion, la svedaj K-doj tion, ktp. Tiu ekzemplo povas montri al vi, ke estas necesa la nuna sinteno, la nuna strukturo de SAT. SAT havas ĉian kaŭzon ne esti pornaciisma, sed kontraŭbatali akre ĉiun naciismon. Vi ĉiuj konas diversajn Int-ojn. Vi aŭdis jam hieraŭ okaze de kelkaj alparoloj la opinion de iuj K-doj, kiuj pensas, ke la Int-oj ne sukcesis gvidi la proletaron de l' mondo. Tiuj K-doj, laŭ mi, pravas. Ankaŭ la demando estas teknika. En Germanio nun ekzistas du LEA-oj. k povus eĉ esti 3—4 diverstendencaj tiaj org-oj. Ĉiu novaliĝinto havos la malfacilan elekton, al kiu el tiuj orgoj aliĝi. Nuntempe ili *ĉiuj* povas fariĝi SAT-anoj k esti membro en la diversaj LEA-oj; sed estas nur unu tutmonda org-o: SAT. Estus danĝero gajni tro da novaj membroj; ankaŭ la monafero estas pritraktinda. Fakte ne sufiĉus la nuna LEA-kotizo. Se ni volus teni la tutan SAT-aparaton, oni ankaŭ devus teni la tutan kotizon de SAT.

K-do *Eerdmans* (Roterd.): La defendo estas tre malforta k tute ne klara; valorus aŭdi pli bonajn kontraŭstarojn. Mi opinias la prop. plej taŭga por plibonigi la SAT-movadon.

Komentoj k konkludoj al la raportaro de la Plenum-Komitato.

Post enkondukaj vortoj *K-do Lanti* diras: Ni unue volas substreki, ke neniel ni provis vuali la veran staton de nia Asocio k entute nia raportaro estas plej sincere k verame farita...

Ĉe la legado de la membro-nombroj vi certe havis kiel ni amaran senton: Nia organizo, kiu antaŭ tri jaroj atingis preskaŭ 7000 membrojn, nun havas apenaŭ 2000 ... Ĉu do la skismo perdigis al ni 5000 membrojn? Kaj ĉu tiuj fakte, reale k ne surpapere troviĝas nun en la tendaro de la skismigintoj? Se oni povus jese respondi al tiuj demandoj, la skismo farita estus malpli ĉagrena k ties kaŭzintoj malpli riproĉindaj. Bedaŭrinde la skismigintoj ne povas prave flati al si, ke ili arigas efektive la 5000 anojn, kiuj mankas ĉe ni. Sed ili fanfaronas eĉ pri 12 000 membroj! La blufo tamen neniam estis sufiĉa bazo por starigi seriozan entrepenon. La plej supraĵa ekzameno super la faktoj ebligas tuj ekvidi la trompon. Oni ja konstatas, ke la personoj, kiuj parolas pri 12 000 membroj, povas aperigi nur dufoje monate sespaĝan gazeteton, kiun ili sendas al la abonantoj po du n-oj k nur *unufoje* en la monato por ŝpari afrankon.

Ni ankaŭ estis devigataj aperigi „S-ulo"n nur dusemajne; sed ĝi almenaŭ aperadis regule, akurante k en amplekso de 12 k eĉ 20 paĝoj, ĉar la abonantoj ankaŭ ricevis „La Nova Epoko"-n. Tiu simpla komparo inter „Sennaciulo" k „Internaciisto" plej bone montras, kie kuŝas efektive la pli granda forto. Sed kompreneble oni ne povas ne bedaŭri pro la disigo de la fortoj, kiam oni memoras, ke ĝis antaŭ 2 jaroj nia gazeto aperadis semajne en amplekso de 12 paĝoj k kun eldonkvanto de 4 500 ekz-oj ...

Estas vere, ke „Ekrelo" montris relative grandan eldonforton. Sed, ĉu mirige? Tiu forto venas grandparte de la kapitalo ŝtelita al SAT ... Nu, ni prefere silentu pri tia hontinda faro, kiu makulas parton de la laborista esperanta movado ...

Kompreneble, la disigo faris truon en niaj vicoj. Kaj se ĝi estas relative granda, estas ĉefe pro tio, ke en Sovetio multaj, tre multaj el niaj amikoj devas *kontraŭvole* partopreni la skismon. Se ni lasas flanke la 2000 sovetianojn, kiuj vole-nevole devas resti ekster nia movado, restas ankoraŭ 3000 mankantoj. Ni taksas, ke preskaŭ la duono da ili ne realiĝis pro tio, ke trafis ilin la terura senlaboreca krizo, kiun ni travivas. Inter la eksiĝintoj troviĝas ankaŭ netaksebla proporcio da K-doj, kiuj seninteresiĝis pri la tuta afero, tial ke ilin naŭzis la disputoj k polemikoj, kiuj regis en nia movado dum pli ol du jaroj. Ekzistas ja relative multaj personoj, kiuj ne volas rompi al si la kapon por esplori detale konfliktojn k ektrovi, en kiu tendaro kuŝas la pravo k en kiu la malpravo. Ili emas pensi: „ambaŭ malpravas" k ne plu volas aŭdi ion ajn pri la tuta konflikto.

Rabo, skismo, senlaboreco, indiferentiĝo, tiaj estas la ĉefaj kaŭzoj de nia malprogreso.

El la granda baraktado, kiun spertis nia movado, ĉu tamen ne rezultas io pozitiva? Ni opinias, ke jes. La fakto, ke SAT povis elteni kontraŭ la plej furiozaj, plej ruzaj k malnoblaj atakoj, estas laŭ ni tre elokventa atesto pri ĝia nedetrueblo; la fakto, ke ni aperigis Jarlibron, du bonajn instrulibrojn, la Kongresprotokolaron k regule la gazetojn; la fakto, ke ni troviĝas nun en Ŝtutgart por teni nian XII-an, regule aranĝitan kongreson, estas nekontraŭdirebla pruvo, ke SAT vivas k ke tute fiaskis la provoj por ĝin mortigi ...

Se laŭ la nombro da anoj ni refalis en la staton de la jaro 1923-a, tio tamen neniel signifas, ke nia movado reale tiom malantaŭeniris. En tiu epoko SAT estis apenaŭ konata en Esperantio; ĝi estis eldoninta nur tri verkojn; hodiaŭ ni posedas stokon da libroj, kiuj reprezentas atentindan kapitalon; hodiaŭ la eldonaĵoj de SAT havas bonan reputacion k estas rekomendataj. En 1923 SAT estis ankoraŭ permesata en la faŝista Italio. Hodiaŭ ĝi estas tie malpermesata k ankaŭ alie ...

Ni deziras tamen, ke vi forte konvinkiĝu, ke la SAT-arbo ne estas faligebla. Se falis kelkaj branĉoj, se putris kelkaj radiketoj, malgraŭ tio la trunko restas tamen sana, fortika k kapabla reatingi sian antaŭan staton. Ni esperas, ke vi reiros hejmen kun tiu konvinko k rekomencos viglan agadon por refortigi vian mondasocion.

Kvankam la veraj kaŭzoj de nia malprogreso estas bone konataj aŭ almenaŭ facile troveblaj, ekzistas tamen K-doj por aserti, ke la tuta malbono en nia movado rezultas de la netaŭga organizsistemo sennacieca. Laŭ ili sufiĉus por baldaŭ „atingi la celon en gloro", fari el nia Asocio iun Internacion. Tio ja estas simpla k facile efektivigebla, ĉu ne vere? Ni devas dum ĉi tiu Kongreso priparoli la aferon tute trankvile k alpreni pri tio decidon. Vi konas nian opinion pri tiu demando k nun ni tute ne intencas longe argumentadi por ĝin defendi. Ni volas tamen altiri vian atenton al tiu nepra neceso prikonsideri la aferon de pure esperanta vidpunkto k liberigite de ĉio partieca k nacieca.

Se objektiva observanto ĵetas ekrigardon super la esperanta movado, li devas agnoski, ke ĝi havas sian tute apartan karakteron k ne estas komparebla kun iu ajn alia movado. Kiuj sekve emas imiti la organizsistemon, aplikatan de partioj k sindikatoj, tiuj faras principan eraron. Aliflanke, kiuj esperas, ke nia lingvo povas esti baldaŭ alprenata k uzata grandskale de registaroj aŭ de gravaj laboristaj organizoj, tiuj havas danĝerajn iluziojn. Ni restas ĉe nia konvinko, ke la esp-a movado povas kreski nur malrapide k ĉefe per la helpo de la esp-istoj mem.

Ĉar ni devos detale pritrakti la organizan demandon en iu el la proksimaj kunsidoj, permesu, ke ni enkonduke memorigu vin, ke

ĝi estis la ĉiama k dorna temo en la neŭtralaj rondoj. Jam ĉe la unua Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro d-ro Zamenhof mem prezentis projekton kun la titolo: *Tutmonda Ligo Esperantista*. Kaj kiom da komisionoj estis starigitaj! kiom da raportoj, da artikoloj verkitaj k diskutitaj! Kaj tiu stato daŭras ankoraŭ nuntempe. Ĉe la ĵus okazinta Pariza Kongreso estis la samaj priorganizaj disputoj pri plej diversaj projektoj k proponoj.

La K-doj, kiuj revas pri unueca organizsistemo en formo de Internacio, ŝajne ne scias, ke la neŭtraluloj jam spertis tiun organizformon. En la jaro 1913, ĉe la naŭa, Berna Kongreso ja estis starigita la *Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj*. Sed la organiza problemo per tio tute ne estis solvita, k ne ĉesis la disputoj. Ili daŭris, daŭras k daŭros tiom longe, kiom la esp-istoj ne komprenos, ke la malrapida kresko de la esperanta movado ne kuŝas en la organizsistemo mem, sed en tio, ke la *bezono* por internacia lingvo ne ankoraŭ ekzistas ĉe la ĝenerala publiko. La plej genia organizsistemo ne povus forigi tiun fakton. Sed por klarigi la malrapidan kreskon de la mondlingva movado, la esperantistoj prefere kulpigas la organizmanieron — simile al la idistoj k.a. mondlingvanoj, kiuj kulpigas la nesufiĉan perfekton de esp-o. Ĉu tio signifas, ke la formo de organiziĝo estas tute indiferenta? Kompreneble ne! Kaj pri tio ni devas atenti la instruojn de la historio. Kion instruas al ni la neŭtrala movado? Se ni lasas flanke oficialajn instituciojn, kiaj estas la Lingva Komitato k la Akademio, kiuj havas tute limigitan kampon, ni konstatas, ke nur U.E.A. povis elteni k vivi inter la amaso da pli malpli mortnaskitaj entreprenoj, celantaj organizi la esp-istaron.

Tial ke la neŭtrala Kongreso nunjare okazis en Parizo, ni havis la eblon kun ĵurnalista enirkarto ĉeesti kelkajn kunsidojn de tiu Kongreso. Nu, estis okulfrapa konstato, ke U.E.A. estas la sola reala forto, estas la spino de la neŭtrala movado. Por ni ne estas dubo, ke sen la kreaĵo de Hodler, kiu celis tre konscie utiligi esp-on por praktikaj celoj, kredeble la esp-a movado ne eltenus kontraŭ ĉiuspecaj t.n. plibonigemuloj.

Ĉe la fondkongreso de SAT, en Praha, ni diris, ke nia organizo devas iel esti la „U.E.A. de l'proletaro". Post dek unu jaroj ni ne ŝanĝis nian opinion. Ni restas konvinkitaj, ke la aliigo de SAT en ian Internacion alportus nenion efektive bonan al nia afero, sed male, ke tiu eksperimento povus eĉ ĝin tre domaĝi.

Por ni do ne temas pri ŝanĝo en la organizsistemo, sed en pli severa, pli preciza aplikado de la ĝisnuna. La demando estas: kiel atingi, ke kiom eble plej multe da laboristaj esp-istoj *utiligu praktike* la lingvon por la interesoj de sia klaso? Kiel atingi, ke la miloj k miloj da personoj, kiuj pli malpli lernis esp-on, fariĝu reale esp-istoj? Kaj ne estas esp-istoj tiuj personoj, kiuj ne abonas esp-lingvan gazeton, ne legas esp-an literaturon k ne havas korespondantojn en kelkaj landoj. Kiu restas izolita aŭ kontentiĝas per simpla aliĝo al sia loka grupo, kiun li pli malpli regule vizitas k kie oni nemalofte parolas nacilingve, tiu fakte ne estas esp-isto. Oni povus havi 50 000-membran Internacion el tiaj anoj, tio tute ne signifas, ke forta estus tia organizo. La ĉiama problemo precipe do ne estas: kiel oni varbu al esp-o multajn anojn, sed kiel ni faru por teni la varbitojn, por ligi ilin firme al la movado? Pro la jam menciita kaŭzo, ke ĝenerale la homoj ne sentas veran, urĝan bezonon al esp-o, la problemo ne estas nun facile solvebla. Sed kompreneble ni havas la konvinkon, ke ekestos tiu bezono en pli malpli proksima estonto. La sperto montras, ke ĝenerale restas ligitaj al nia movado la personoj, kiuj tiras profiton el sia scio de la lingvo. Ho, ni ne pensas pri mona profito, kvankam jam ekzistas kelkaj, por kiuj esp-o konsistigas vivrimedon, sed pri instrua, spirita profito. Per legado de gazeto k de literaturo estas jam eble havi tian profiton. Pro tio ni ĉiam celis plivalorigi la gazetojn k pliriĉigi la prolettendencan literaturon. Ĉiuj niaj fortoj devas streĉe resti orientitaj al tiu direkto. Ni havas la opinion, ke se nia gazeto havus 10 000 abonantojn, aperus en amplekso de 20 paĝoj k ĉiusemajne, nia movado estus multe pli forta, laborus multe pli efike, pli rezultodone ol se ni havus ian Internacion kun 20—30 000 membroj, kiuj ricevus kiel esp-an legaĵon nur monatan sensignifan gazeteton. La presaĵoj de kiu ajn movado estas la ĝusta mezurilo pri ĝia forto.

Kiel do ni faru por ebligi al kiom eble plej da laboristaj esp-istoj aboni „Sennaciulo"-n? Ĉu tiucele ni devas ŝanĝi la strukturon de nia Asocio? Ne, Gek-doj, la malfaciloj ne kuŝas en la organizformo; pri tio ni insistas; la malfaciloj estas ĉefe duspecaj: la unua estas la ekonomia krizo, kiu senlaborigas k mizerigas grandan nombron da K-doj. Tiun kaŭzon SAT ne povas forigi k pri ĝi respondecas nur la kapitalisma sistemo; la dua estas la emo ĉe relative multaj el niaj membroj prikonsideri la esp-an aferon je partieca vidpunkto, k kiuj pro tio deziras havi partiecan gazeton, kun enhavo simila al tiu, kiun ili trovas en sia nacilingva gazeto. Kontraŭ tiu esenca, principa eraro oni povas reagi per laŭcela edukado. Tion ni ĉiam provis pli malpli sukcese. Ekzistas jam K-doj, kiuj estas tute lojalaj al sia partio k kiuj tamen bone komprenas, ke ĝis ilia partio mem prenos la esp-an aferon en la manojn, nia Asocio devas ekzisti, prosperi k pro tio sekve esti nepre senpartieca, t.e. lojala al *ĉiuj* tendencoj el la lab. klasbatala movado.

Sed ekzistas ankaŭ partianoj, kiuj eĉ ne komprenas la ĝustan, profundan signifon de la vorto *edukado*, kvankam ĝi estas sufiĉe klare difinita en la Statuto de SAT. Por kelkiuj edukadi estas simple instrui, encerbigi al homoj la „verojn", eldiritajn de la respondecaj partiaj gvidantoj. Vi povis eĉ legi en „S-ulo", ke socialisto tute ne kredas, kion diras komunisto k inverse. Laŭ tiu stranga vidpunkto ĉiu homo havus sian apartan ne-

fundamentajn org-ajn principojn k pro sia kontraŭeco rifuzus pagi kotizon. Ĝis nun en SAT ĉiuj tendencoj havas siajn rajtojn k povas prezenti siatendencajn artikolojn en la gazeto. Ne ĉiuj komunistoj ankaŭ estas kontraŭ SAT. En kompartia gazeto de la Ruhr-regiono k en „Kämpfer“ aperis objektivaj artikoloj pri nia Kgr. pro niaj klopodoj. Tiuj kom. gazetoj skribis, ke SAT estas klasbatala org-o, dum ĉi tie oni aŭdis de opoziciuloj, ke SAT estas faŝista org-o! Tra okulvitroj tre strangaj tiuj homoj rigardas nian movadon. Finvorte: Konservu la nunan strukturon de SAT k defendu ĝin per ĉiuj fortoj!

K-do *Vesels:* En la rubriko „La Klasbatalo tra la Mondo“ en „S-ulo“ aperis mallongaj raportoj pri strikoj k bataloj en la mondo. Sed pri striko en Holando estis enpresitaj tute eraraj sciigoj. Kompreneble la red. ne estas kulpa. La kunlaborantoj devus raporti pli serioze. Ili skribis pri „bela venko de la holandaj proletoj“, dum fakte okazis salajra malaltigo de 5%. Fakte ne la proletoj, sed la mastroj plene sukcesis en sia plano. — Aperis artikolo kontraŭ la nuna strukturo de nia Asocio: ĝi estas tiel grava, ĉar SAT travivis la bolŝevikan malsanon. Fakte ni nun sukcesis liberiĝi el ĝi. Kaj nun denove aliaj intern-istoj venas por denove malsanigi SAT-on. Neniam la cirkonstancoj por la proletoj estis tiel malbonaj kiel en la nuna epoko de la „Int-oj“. Ĉi lastaj nenion povas doni al ni, nur perfidas nin. Post rebato de l'bolŝevikoj mi avertas kontraŭ la klopodoj de l'II. Int-o detrui SAT-on, transformante ĝin en Int-on. K-dino Klatil skribis sufiĉe fanfarone en „S-ulo“: pli akre ŝi atakis K-don Lanti ol iu ajn; sed ŝi ne atakas *principe* la starpunkton de K-do Lanti, ŝi vidas SAT nur tra la okulvitroj de la II. Int-o, volas fari centrigitan org-on. Estas pli bone k valore havi jam ekzistantan org-on kun nur miloj aŭ eĉ nur centoj da anoj, se tiuj estas vere konvinkitaj revoluciuloj k klasbatalantoj, — ol havi amas-org-on el anoj nur kotizpagantaj k voĉdonantaj, regataj de gvidistoj. Ni tenu la ĝisnunan formon de SAT!

K-do *Fen:* Responde al K-do Vesels mi diru: Se Klatilino estus ĉi tie, ŝi tre fierus, ĉar ŝi estas, laŭ K-do V., la II. Int-o. Tamen estas nur kelkaj anoj de l'Int-o, kiuj deziras la strukturŝanĝon; la aliaj estas kontraŭ tiu intenco, k oni ne povas sekve aserti, ke la II. Int-o havas la intencon ŝanĝi la SAT-formon.

K-do *Puf* (Frankfurt): La K-doj, kiuj antaŭ 10 jaroj plej fervore subtenis SAT, estas nun ĝiaj plej grandaj kontraŭuloj. K-do Lanti, kiu estis kvazaŭ la *dio* de tiuj K-doj, hodiaŭ estas „renegato“, „faŝisto“. Kiel tio povas okazi? Kiel malnova SAT-ano mi scias, ke en la komencaj jaroj nia org-o estis sufiĉe influita de kom. K-doj: mi kiel socialdemokrato tamen diris neniam, ke SAT estas komunista org-o. Kaj nun oni diras: SAT estas soc. demokrata org-o! Mi persone opinias, ke SAT nepre devas resti ĉe la nuna strukturo, ĉar mi kiel soc. demokrato ne estas naciulo, k nur naciuloj bezonas Int-on. En Sovetio estas amaso da iamaj K-doj, kiuj volonte ankoraŭ estus en nia movado. Sed oni tion malpermesas al ili, k tial oni nomas tion *laborista ŝtato*. Ne lasu vin provoki de disĉiploj, kiuj venis ĉi tien el Berlino por difekti iom viajn vicojn: niaj malamikoj estas en la propra lando, en Esperantio. Ili, kiuj antaŭ jaroj fanfaronis pri la sennacieca ideo, nun fanfaronas pri la Int-o. Ĉu oni povas konfidi al homoj, kiuj ĉiutage ŝanĝas la politikan veston? Ni scias, ke la laboristaro povas venki nur per la sennacieca ideo. La esp. movado devas resti superpartieca. Ĉar ni en Germanio ekkonis tion, ni ne sekvis la skismigintojn de SAT, kiuj ankaŭ skismigis la LEA-org-on, k fondis nian org-on, kiu restas superpartieca k apogilo por la sennacieca ideo. La blufo en Berlino malaperos k la K-doj, kiuj batalas kontraŭ ni, denove venos al ni k diros: vi pravas! — Pripensu ĉion de la sennacieca vidpunkto, k neniam faru el nia org-o Int-on. Kvankam SPD-ano (soc.dem.partiano), mi diras: nia esp. movado tute ne koncernas al nia Int-o: SAT restu superpartieca, sennacieca.

K-do *Ulo* (Ŝtutg.): Mi subtenas la vortojn de K-do Puf. Plej multaj konfuzoj okazas tial, ke oni interŝanĝas la ideojn *sennacieco* k *sennaciismo*. Kaj la kompartia opozicio intence identigas tiujn esprimojn por miskreditigi la SAT-movadon. En SAT la sennaciismo ne havas pli da rajtoj ol aliaj tendencoj. Ankaŭ la diferencon inter sekcioj k frakcioj multaj ne scias. En la grupoj oni priparolu de tempo al tempo tiun temon. Pro misinformoj K-doj estas infektitaj de la IPE-anoj (IPE = Int-o de l'SAT-opoziciuloj — Prot.) El Anglio k Moskvo mi havas leterojn de tiaj infektitoj. „SAT nun estas en la servo de faŝistoj k policistoj; ĝi staras nun kontraŭ USSR,“ skribas Moskva K-do. Mi alvokas eluzi sovetiajn korespond-anoncojn (el „I-sto“) por ĝuste informi tiujn K-dojn. Sovetia K-dino konsideras mian opinion kiel tiun de izolulo en Germanio! SAT devus eldoni „Historion pri la SAT-movado“. — Depost kiam foriris la kom. opoziciuloj el SAT, aperis alia frakcio, kiu klopodas transformi SAT en Int-on. Mi malakceptas tiun klopodon, ĉar mi konstatas en Germanio hodiaŭ teruregan naciisman ondegon; eĉ estas danĝero de nova milito, en kiu laboristoj devos interbuĉi sin, ĉar ili ne estas sennaciece edukataj. SAT estas plej bona org-o por mondskala agado. Ĉu GLEA estas pli klasbatala ol ni? Jenajn versojn ni trovas sur la kalendarfolioj de „revolucia“ GLEA-kalendaro: „Kion Dio donis, tion konservu fidele en la koroj ...“ ktp, ks. Ni staras 5 minutojn antaŭ la faŝismo en Germanio. Formi la proletaran unuecfronton necesegas!

K-do *Aarse* (Amsterd.): Mi dum longaj jaroj korespondadis kun rusa K-do el B. ... Li abonis „I-sto“n, k mi demandis, kial li ne estas ano de SAT k abonanto al „S-ulo“. Li respondis, ke li aŭdis pri kontraŭrevolucieco de SAT. Al tiu K-do mi sendis ekz-on

as el tio, ke ĉe la unuaj malfaciloj, la artifike entuziasmigitaj homoj perdas la kuraĝon k falas en ne plu venkeblan skeptikon. Tial ni preferas instigi la homojn al la laboro per malvarmaj, sed raciaj paroloj. Ĉu do ne suficas esti firme konvinkita pri la noblo k gravo de afero por ĉerpi en tio nevenkeblan kuraĝon k persiste, senlace laboradi por proksimiĝi al la celo?

Nia movado troviĝas nun diversrilate en kriza tempo. La skismo estas fakto k la rekuniĝo de la fortoj ne baldaŭ povos okazi. La skismigintoj klopodas nun starigi sian movadon laŭ internaciismaj principoj, k kun partieca karaktero. La estonto sekve montros, ĉu tiu kompreno pri la organizado de la laborista esp-a movado estas pli ĝusta ol la nia. Dume ni fosu nian sulkon, profunde, rektlinie k senŝanceliĝe.

Kompletigoj al la Administracia Raporto.

K-do *Lerĥner* (Lajpcig) legas la nombrojn de la bilanco por 1931/32 k klarigas la diversajn punktojn el la perdo- k gajno-kontoj. Li konstatas konsiderindajn ŝparojn en salajra, administra, lu-hejt-luma k korespondaj kontoj. Deficiton je „S-ulo"-konto li klarigas per malaltiĝo de l'abonantoj; ĉi tiuj devus esti *minimume* 2000 por ekvilibrigi la konton. Aliel ni devus ankoraŭ ŝpari je la amplekso de l'gaz. (ekz. 4 paĝojn monate malpli liverante); ankaŭ per sendo de l'ekz-oj por iu loko al kolektiv-adreso oni kontribuas redukti la elspezojn de tiu konto! „LNE", „La Lernanto" k kotizkonto estis gajnon montrantaj kontoj (la du unuaj je kostoj de „S-ulo"), sed precipe la librokonto (propraj k fremdaj libroj). Estis vendataj same multaj libroj kiel antaŭjare, malgraŭ la pli granda mizeriĝo de l'lab. klaso. Plejparte helpis al tiu gajno „Petro". La Gek-doj uzu ĉe la nunjaraj aŭtunkursoj la novan „Petro"n por helpi al la prospero de SAT. Insignoj ankaŭ donas monon al la Asocio: ĉiu K-do portu SAT-insignon. Ilustritaj poŝtkartoj ne facile vendiĝas, tamen ĉe grandskala mendo (por festoj ktp) ni volonte cedus ioman rabaton. La salajrokonto malaltiĝis je 100%. Helpu malaltigi la admin. elspezojn farante klare k koncize la mendojn k *antaŭpagante* por ili. La debitora konto estas nun relative malgranda, ĉar ni eliminis kiel neakireblajn sumojn la sovetian kontaron. Kreditoroj male estas multaj, k repagi niajn ŝuldojn al tiuj dankindaj K-doj ni povos nur, se ĉiuj fervoruloj streĉos siajn fortojn en la venonta jaro, mendos librojn, varbos membrojn k abonantojn ktp. La akcikonto malaltiĝis pro malmulta vendo k repagoj (per mendoj). Kurzfaloj en diversaj landoj (Britio, Svedio) malutile efikis.

K-do *Lerĥner* poste legas raporton de la *Administracia Komisiono* en Lajpcig (K-doj Wendt, Siedentopf k P. Bauer). Ĝi kunvenis 8-foje dum la jaro; ĝi konstatas la sindonemon k laboremon de l'admin. laboristoj. Je 19. 7. 32 ĝi kontrolis k reviziis en la administrejo librotenadon, librostokon k disponeblan monon. Ĝi konstatis, ke la libroj estas en bona ordo k proponas al la Kgr. aprobi la kasraporton k deŝarĝi la administranton.

Dua laborkunsido: 8-a de aŭgusto, 20,20 horo.

(Pridiskutado de la Raportaro de la Plenum-Komitato.)

K-do *Johanson* prezidas. K-do *Dojbler:* En la raportaro, kiun mi ricevis per „S-ulo" k kiu aperis en tia simpla lingvo, kuŝas multege da laboro farita de la P.K. Mi kiel Ĝenerala Konsilanto ricevis cirkulerojn de l'P.K., k mi ne scius demandon, pri kiu ni ne interrilatis k interharmoniis. Precipe la demando, ĉu SAT havu partiecan karakteron. Ni ne povas konstati, ke la Asocio forlasis sian dekomence akceptitan taktikon. En la unuaj jaroj estis ĝuste la kompartiaj K-doj, kiuj tiel ĝoje k entuziasme akceptis la sennaciecan strukturon de SAT k ĝuste pro tiu karaktero kunlaboris. Mi estas konvinkita, ke venos la tempo, kiam tiuj K-doj regrupiĝos en SAT. La nuna strukturo de SAT por samlingvanoj-proletoj en la tuta mondo estas la plej bona. Al la laborintoj en P.K. k aliaj, kiuj oferis tempon, monon, laborforton, multajn noktojn por eviti ĉiujn rifojn k rokojn en la SAT-maro onde bruanta, mi esprimas mian dankon. Same mi dankas al ĉiuj, kiuj venis al nia XII-a malgraŭ la malfavoraj nunaj cirkonstancoj.

K-do *Fen* (Amsterdam): Mi komprenas la valoron de la laboro de niaj gvidantoj. La SAT-organo estas por ni tre valora. Kiam mi ĝin legas, mi scias, ke mi trovas en ĝi sciigojn, kiuj estas por ni gravaj; artikolojn kiuj estas verkitaj tendence *principe*, ni povas toleri en ĝi, ĉar ni devas kompreni, kion tiu aŭ alia tendenco deziras, k fakte la *celo* por ĉiuj estas la sama. Ni nepre atentu ne skribi kontraŭ aliaj tendencoj de l'lab. movado, sed nia laboro estu *konstrua*, sur supertendenca bazo.

K-dino *Falkenher* (Dortmund): Ĉefe interesis min en la raporto la fakto, ke nia SAT-anaro tiom malgrandiĝis. Ni devas esplori, kial k kiel ni konstante perdis membrojn. Kaj ni ĉiuj povas konstati, ke la ekzistantaj Int-oj neniel helpas al la laboristaro k al nia movado. Ili ne havas la ĝustan bazon por krei pli bonajn vivcirkonstancojn. Tial ni klopodu restigi la nunan strukturon de la org-o; ni laboru kiel ĝis nun por SAT. En Germanio la du grandaj lab. partioj, anstataŭ kuniĝi, klopodas disigi la laboristojn, k tiel kreskigas la faŝismon. Kaj la faŝismo prosperas ĉie. Ni nepre konservu la konstrumanieron de nia org-o. — Hodiaŭ matene ni aŭdis, ke iu kompartiano ne volas subteni la Kgr. per aliĝmono. La partioj neniam tolerus anojn, kiuj kontraŭus en iliaj vicoj la

diskuteblan „veron", kiu ne estus komunikebla al alia! ... Kiam SAT-anoj havas tian spiritostaton, oni povas facile kompreni, ke ili trovas ĉion malbona en nia Asocio ...

Ni kredas, tamen, ke la granda plimulto el la SAT-anoj ne deziras partiecigi la Asocion. Se tiel estas, la problemo, kiun temas solvi, estas jena: Kiel ebligi, ke kiom eble plej da K-doj povu ricevi regule aperantan gazeton, bone redaktatan k per fidinda materialo sendita de K-doj loĝantaj en la plej diversaj partoj el la mondo? Ni devas ne forgesi, ke bonvolemaj k kompetentaj kunlaborantoj ne svarmas en nia movado k tiu fakto estus eĉ sufiĉa motivo por ne partiecigi nian laboristan esp. movadon. Ni devas sendube celi, ke la gazeto estu kiom eble plej malmultekoste abonebla, sed ankaŭ, ke la K-doj sentu bezonon al ĝi. Oni povas konstati, ke multaj kontentiĝas per la esperantlingva teksto, kiun ili trovas en sia LEA-organo. Se tiuj gazetoj estus redaktataj preskaŭ ekskluzive en nacia lingvo, la legantoj unue sentus la bezonon por esp-a legaĵo; due la gazeto ne bezonus esti tiom ampleksa, do estus pli malmultekosta. Pro tio la kotizo al la koncerna L.E.A. povus esti pli malalta k tio ebligus al pli granda nombro da K-doj aliĝi al SAT kiel aktivaj membroj.

— — — — — — — — — — — — — —

Kiel vi do povas facile kompreni, la demando ne estas pri aliiĝo de SAT en ian Internacion; tio tute ne solvus la problemon; la demando estas pri mono k pri la plej trafa maniero utiligi la fortojn de la tuta lab. esp-istaro.

Kelkaj K-doj ankaŭ kelkfoje plendis, ke la nuna strukturo de SAT ne ebligas fari internaciskalan propagandon. Kion valoras tiu plendo? Unue rimarkon: ĉu do niaj Kongresoj ne liveras al vi ĉiuj la eblon propagandi esp-on? Ni asertas, ke jes; tio dependas de via lerto, de viaj rilatoj k influo en vialandaj organizoj. Sendu raportojn pri la kongreso aŭ pri viaj spertoj dum la vojaĝo ktp. prezentitaj laŭ maniero, kiu elstarigas la grandan valoron k signifon de esp-o. Kaj eble kelkaj K-doj ne scias, ke okaze de ĉiuj el niaj kongresoj, ni sendas invitleterojn al la plej gravaj internaciaj organizoj. Kiam „S-ulo" aperis 12-paĝe k ĉiusemajne; kiam la Jarlibro aspektis relative impone, ni sendis samtempe tiujn eldonaĵojn, kiujn ni menciis en la invitletero. Nunjare ni ricevis de la invititaj organizoj kelkajn leterojn, inter kiuj ni menciu tiun de la Sindikata Internacio en Berlin. En tiu letero estas dirite, ke la organizo ne sendos delegiton, sed ke tio fakte ne necesas, tial ke la estraro estas konvinkita pri la valoro de esp-o. Vi certe aŭdos kun intereso la koncernan parton el tiu letero, skribita ... franclingve: „... mi estas aparte feliĉa povi certigi vin, ke ni estas nepre konvinkitaj pri la utilo de internacia lingvo, tia, kia estas esp-o; ni jam havis la okazon konstati kun kia facilo lab. delegitoj de diversaj landoj povas per ĝi interkompreniĝi. Nova eksperimento ĉe via kongreso en Ŝtutgart sekve ne estas por ni necesa por konvinki nin ..." Tiu letero estas subskribita de la sekretario Ŝevenels. Restas al la Gek-doj, kiuj apartenas al tiu Internacio, bonuzi tiujn aŭtoritatajn dirojn ...

Ĉu ni faris ĉion farindan? Ho! bedaŭrinde ne. Ĉiutage ni konscias, ke ĉi tio k tio estus farebla, ... se la tempo k mono tion permesus al ni. Tial ke nun tiuj malhelpoj ne estas forigeblaj, ni volonte konsentus al la starigo de *Propaganda Fako,* kiu povus preni sur sin la necesajn klopodojn por instigi ĉe oportunaj okazoj la diversajn internaciajn organizojn, ke ili okupiĝu pri la mondlingva afero. La ekzisto k funkciado de tia aparato neniel necesigas ŝanĝon en la organizsistemo de nia movado. Necesas nur bonvolo k adaptiĝo al la normala funkciado de SAT. Se troviĝus K-doj pretaj por funkciigi iun Propagandan Fakon, kompreneble en akordo k sub la kontrolo de la Plenum-Komitato, ni volonte rekomendus ĝian starigon.

Ni cetere ĉiam havis kiel principon ne malkuraĝigi la iniciativon de niaj membroj. Oni memoru pri la multaj fakoj, kiuj stariĝis en la kadro de SAT. Neniam ni provis malhelpi, sed male kuraĝigi k konsili. Plej multe el ili fiaskis, tial ke la internaj fortoj mankis. Ĉiam ni atentigis pri la neceso esti tre moderaj en la taksado pri efektivigeblaĵoj, tre modestaj en niaj pretendoj.

Ĉe la komenco de nia agado en la esp-a movado ni ankaŭ havis iluziojn; ni pensis, ke la varbado de famaj, aŭtoritataj personoj forte antaŭenpuŝos nian aferon. Pro tio ni multe klopodis ĉe tiaj homoj k estis varbitaj de ni Romen Rolan, Henriko Barbus k.a. Unu el niaj kongresoj eĉ okazis sub la patronado de la fama scienculo Alberto Ajnŝtejn, kies kuraĝigan leteron ni ankoraŭ posedas. Verdire la paroloj de tiuj famuloj ne multe helpis. Ili certe ne estis tute senutilaj, sed ilia efiko estus multe pli granda, se tiuj homoj fariĝus mem esperantistoj; se ili verkus en nia lingvo k pruvus tiel per fakto, ke ĝi posedas ĉiujn kvalitojn, kiujn ili laŭdis ...

Ni do perdis tiurilate niajn iluziojn k akiris la konvinkon, ke la esperantemuloj, eĉ la plej famaj, ne multe utilas al la movado. Ni povas antaŭeniri nur malrapide per senlaca, pacienca k modesta laboro ...

Karaj Gek-doj, ni petas pardonon pro tio, ke nia parolo estas tiom seke racieca, neentuziasmiga. Vi sendube preferus aŭdi, ke alvenis la tempo, kiam baldaŭ la esp-a afero grandpaŝe antaŭeniros. En la historio de la esp-a movado, tiaj esperplenaj paroloj ne mankas; oni eĉ povas trovi ilin el la buŝo mem de d-ro Zamenhof. Ni ne dubas, ke la aŭtoro de esp-o havis tiajn esperojn. Li parolis sincere, ne agitece kiel demagogo en balota amaskunveno. Sed ni ne rajtas havi la samajn iluziojn, kiel la unuaj pioniroj de la esp-a movado. Ni devas atenti la sperton, prikonsideri ĝuste la faktojn. Se oni vekas ĉe homoj tro grandajn esperojn, se oni entuziasmigas ilin per fantaziaj asertoj, rezult-

majo 1932 — 4 003 253 tunoj en valoro de 86 438 000 zlotoj. Samtempe pligrandiĝis la karb-importo el 8 835 t. (je valoro de 308 000 zl.) en 1. 5. 31 ĝis 39 506 t. (je valoro de 1 119 000 zl.) en 1. 5. 32.

Strikoj, naciistaj manifestacioj.

Longdaŭra teksista striko en Bjalistoko okazis kontraŭ nova salajra malaltigo. La profesiaj sindikatoj el tuta Polio sendis monhelpon por tiu striko gvidata en plena solidaro.

En Novogradek (Orienta Polio) rapidjuĝejo mortkondamnis 4 personojn akuzitajn pro bruligoj, sabot-agoj, mortigoj ktp.

En Varsovio la 11-an de julio okazis manifestacio kunvokita de 100 unuiĝoj (plejparte registaraj) kontraŭ Germanio k por defendo de la „pola koridoro“. La manifestaciantoj rezoluciis, ke „ĉiun manon etendiĝantan al sankta pola tero ni rompos“. Ĝenerale oni povas rimarki en Polio sekve de la Hitler- k Papen-reĝimo maltrankviliĝon, kiun scias bone eluzi niaj militismemaj rondoj. La germana reakcio servas aktive al la pola reakcio.

Kontraŭagado kontraŭ faŝismo en la vilaĝoj.

Pri „Orient-Galicia kamparana ribelo“ oni povis legi jam kelkajn liniojn en „S-ulo“ n-o 392. En la koncernaj teritorioj depost ioma tempo la administracio laŭ iniciato de faŝist-registaraj gvidantoj volis devigi la vilaĝanojn partopreni en tielnomata „Festo de laboro“. Ĉi tiu originala invento de niaj faŝistoj havas nenion komunan kun ia ajn festo. Simple oni devigas la tutan loĝantaron ĉesigi siajn hejmajn laborojn k partopreni senpage en publikaj laboroj (riparado de vojoj, digoj, ktp.). Kompreneble, ke la vilaĝanoj tre nevolonte partoprenas tiun entreprenon, k en la distrikto de Lisk laŭdire vilaĝanoj ekkomprenis la signifon de tiu „festo“ kiel revenon al servuto. Tial komenciĝis tie sangaj interbataloj kun policanoj. La tuta distrikto estis invadata de policaj trupoj k la vilaĝanoj forkuris montaron k tie kaŝiĝis. Kelkfoje ili aperis armitaj, k okazis bataloj. La gravon de la okazintaĵoj montras la fakto, ke la tutan polican agadon surloke gvidis direktoro de l'polica departemento en la enlanda ministerio Hanke-Novak, kiu speciale alveturis el Varsovio. Sekvis amasaj arestoj. Kelkaj vilaĝanaj taĉmentoj forrifuĝis en la montarojn proksime de la ĉeĥoslovakia landlimo.

Disvolviĝo de l'vilaĝana partio.

Post unuiĝo de tri antaŭe ekzistintaj vilaĝanaj partioj en unu Popolan Partion, ĉi tiu komencis forte organizi la vilaĝaron. La granda mizero reganta inter la kamparanoj k treega malkontento pri la nunaj kondiĉoj helpas multe en tiu agado. La amaskunvenoj kunvokataj de l'Popola Partio (pole: Stronnictwo Ludowe) estas laŭ poliaj kondiĉoj imponaj. Laŭ diroj de l'gvidanto de tiu partio Vitos, li dum sia tuta vivo neniam vidis tian grandegan ekinteresiĝon de l'amasoj. En kunvenego de Limanova (Galicio) partoprenis 1800 ĉevalrajdantoj (tielnomata „Canderja“) k 32 mil homoj. La polico ĉiuforte malhelpas, sed tio jam ne havas grandan signifon. Dum unu el tiuj amaskunvenoj en vilaĝo Zapanov okazis batalo kontraŭ la policanoj, dum kiu estis mortigataj 5 kamparanoj k multaj vundataj.

Socialista Gazet-Informejo Esperantista. (Varsovio.)

Por ke „LA NOVA EPOKO“ pluvivu
17775 K-do Poupa *fr. fr. 20.–*

DISKUTEJO:

El aŭstria vidpunkto.

La ĉi suba artikolo venigos sendube multajn respondojn k eĉ ĝustigojn pri la faktaj eraroj, kiujn ĝi entenas. Ni tamen jam hodiaŭ volas fari denovan rimarkigon, nome, ke ĝenerale K-doj estas tre malbone informataj pri la stato k organizprincipoj de la laboristaj movadoj en diversaj landoj, krom la propra. Nia gazeto povus multe helpi al tiu informado, se kunlaborantoj konsentus priskribi objektive la staton k organizmanieron en sia propra lando. Ekzistas tre grandaj diferencoj inter la diverslandaj laboristaj movadoj. Por citi nur unu ekzemplon, ni diru, ke en Belgio k Francio la laboristaj movadoj havas tute malsaman karakteron k ne estas kompareblaj. Ĉu finfine troviĝos en la lab. esp. movado K-doj kapablaj k emaj ... utiligi esperanton? Nia sennacieca lingvo ne povas k sekve ne devas esti politika agitecilo. Tion ni ne laciĝos ripeti. — E. L.

En „S-ulo“ n-o 389 aperis artikolo: *El Danio.* La unua frazo de tiu artikolo asertas, ke „Marks avertis kontraŭ interligo de l'sindikatoj kun politika movado.“ Bonvolu, K-do Nilsen, precize citi, kie k kion skribis Marks tiurilate? Se mi ne eraras, Marks skribis, ke „ĉiu klasbatalo estas politika batalado.“ Sindikata movado k politika movado estas partoj, — diversaj partoj de la sama nedisdividebla proletara klasbatalo.

Ĉiuokaze eraras, kiu tiujn partojn kontraŭstarigas, unu kontraŭ la alia. Ni povas, eĉ devas kritiki la unuopajn politikajn partiojn en la diversaj landoj. Ni kritikas k juĝas la unuopajn partigvidantojn laŭ tio, kiel ili kondutas; kiel ili klarigas k mem aplikas la marksismon en la ĉiutaga praktika klasbatalo. Se politika partio, laŭ nia opinio, ne bone, ne ĝuste funkcias, ni klopodu plibonigi, pliĝuste direkti ĝin. Sed apartigi la politikan k sindikatan movadojn, kiel K-do Nilsen tion esprimas, — tion mi ne povas aprobi. Sindikatistoj nomiĝas tiuj, kiuj nenion volas aŭdi, scii pri politiko. Sindikatistoj estas tre malbonaj, eĉ malsaĝaj sindikatanoj. La laboristaro, unuigita en la sindikata movado, klopodas plibonigi la salajrojn. Sed ni volas ĉesigi la salajrosistemon. Pro tio ankaŭ la politika batalo estas bezonata. Kapitalistoj, mastroj elpensis k intencas efektivigi la t.n. „Kunagantajn Prof. Unuiĝojn“. Klaskonscia proleto, celkonscia sindikatano nur ridetas pri tio.

Se vi ne estas klaskonscia ano de iu celkonscie batalanta sindikatorganizo, se vi estas nur simpla inteligenta homo: ĉu vi povas imagi, ke homoj okupitaj en la sama profesio, sed apartenantaj al kontraŭstarantaj sociaj klasoj, ke laboristo k mastro povas kune vivi en la sama organizo, ke ili povas havi komunajn interesojn? Tion volas kredigi la Kunagantaj Prof. Unuiĝoj!

Mi ne konas la cirkonstancojn en Danio. Tie eble troviĝas proletoj, kiujn oni sukcesis logi en tiujn fiorganizojn. Ĉe ni tiaj ne ekzistas. — La proletara klasbatalo en la sindikata movado nuntempe ne povas akiri favorajn rezultojn. Tiun bedaŭrindan fakton kaŭzas la ekonomia krizo, k ne tiu cirkonstanco, ke dum la evoluo la politika partio fariĝis potenca faktoro en la socia vivo. Dum la evoluo de la socia organismo ŝanĝiĝas la fortorilatoj, estiĝas novaj situacioj. Nova situacio postulas novan taktikon en la gvidado de la sindikatoj. Oni povas kritiki, eble ŝanĝi la taktikon, sed la sindikatoj devas resti klasbatalaj organizoj.

La definitivan venkon la proletaro nur tiam povos akiri, se ĝi sukcesis fariĝi ekonomia potenco. Tia ekonomia evoluo neniam estus ebla, sen politika potenco. Ĝuste gvidata politika movado akiras la politikan potencon. Nur poste, en la freŝa aero de la vera, nefalsita libero, povas sekvi la ekonomia evoluo k dum tiu evoluo la definitiva, nun prokrastita, tamen neevitebla venko de la laborista klaso. *17 418, Vieno.*

MI VOLAS SCII...

1. La veron pri t. n. libera amo en Sovetio, ĉar niaj burĝaj gazetoj akcentas, ke pri la infanoj de disigitaj gepatroj ne estas zorgata.

2. Ĉu oni el iu ajn lando povas veni tien k ricevi laboron? *9135.*

Malmultaj pensas pri tio,

ke inter la organizoj uzantaj esperanton troviĝas ankaŭ la *Internacia Labor-Oficejo* (Ligo de Nacioj), *Ĝenevo.* Ĉi tiu institucio povas liveri al vi — k ĝi eĉ estas kare pagata por tiu tasko! — ĉiuspecajn informojn pri laborkondiĉoj ktp. Sekve oni bonuzu ĝiajn servojn; skribante al ĝi en esperanto, oni propagandas samtempe por nia afero.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj.

La aktiviĝo de LEA en Norda Ameriko

Norda Ameriko estas tre kruda k ĝenerale malfavora teritorio por la rapida disvolviĝo de la laborista esp. movado. Ĉi tie, kiel ĉiu lab. movado kultura, same ankaŭ la lab. esp. movado estas importita de enmigrantoj. Tiu kampo tamen ne estis tiel favora, ĉar la enmigrintoj havas la ĉefan zorgon dum multaj jaroj ellerni la anglan lingvon. Ke la lab. esp. movado en N. A. tiel hontinde postrestadis for de tiu en eŭropaj landoj, pri tio kompreneble estas ankaŭ aliaj kaŭzoj, similaj al tiuj en Eŭropo, antagonismo, indiferento pri esp-o. Kaj se ni volas esti tute sinceraj, – la nuna mizera stato de la lab. esp. movado en N. A. estas kaŭzita de la kompleta malunueco de la N. A.-a lab. esp-istaro.

„En unuiĝo estas forto“, estas la plej granda vero nekontestebla, k jam de 1–2 jaroj kelkaj provoj okazis por organizi tutlandskale la N. A-an lab. esp-istaron, sed la respondoj al la alvokoj estis tute ne kuraĝigaj por plua agado. Tre strange, ke eĉ kelkaj malnovaj spertuloj, SAT-anoj, konsideris la fondon de LEA ne ankoraŭ aktuala, k kelkaj aliaj spertuloj elmontris nur malintereson.

En multaj grandaj urboj ĝis antaŭ ne longe neniu laborista esp-isto loĝis. Ŝajnis esti nesolvebla dilemo por ni, kiel enplanti esp-on en tiuj urboj. Estis nur unu rimedo: *Koresponda Kurso*. Bedaŭrinde nur SAT-ano 29 provis aranĝi korespondan kurson laŭ alvoko en lab. gazetoj. Dank' al tiu koresponda kurso esp-o enradikiĝis en multaj urboj de Usono, Kanado, Kubo. Sekve en kelkaj lokoj eĉ grupetoj formiĝis, k estas formiĝontaj. En Detroit tuta grupo da rumandevenaj laboristoj finis korespondan kurson laŭ speciale ellaborita sistemo. Tiu kurso, kiun iuj Gek-doj ĉi tie konsideris kiel bagatelan entreprenon, pruviĝis esti bonega disvolvilo de esp. movado (ni treege rekomendas al Sud-Amerikaj, Aŭstraliaj Gek-doj provi komenci korespondan kurson. Petu informon pri niaj sistemo k spertoj). La fina rezulto estas, ke nun en multaj urboj ni havas kelkajn fervoregajn pionirojn de nia movado. En Nov-Jorko formiĝis C.O.K. (Centra Organiza Komitato) kun sekr. SAT-ano 29 por organizi LEA en N. A. Konstanta kontakto kun ĉiuj grupetoj, grupoj, individuoj estas establita. Entuziasmo de niaj pioniroj en ĉiuj lokoj estas garantio por sukceso. Ankaŭ la iamaj skeptikuloj esprimis emon por kunlabori. Kompreneble, nia LEA komence travivas sian „infanaĝan malsanon“: financa malpovo aranĝi pli grandskalan propagandon. Granda senlaboreco neniam ĝis nun spertita en Usono malebligas al ni eldoni regulan LEA-Bultenon. Niaj gemembroj ne povas aĉeti esp-an literaturon, nek aboni esp-an gazeton, k multaj el niaj varbitoj ne povas aĉeti eĉ lernolibrojn. Tamen dank' al la penado de nia Nov-Jorka grupo ni eldonis ĉ. 10 000 flugfoliojn presitajn, k ni distribuigis multajn. *New-York-City* estas jam malnova nesto de la N.A.-a. lab. esp. movado, sed en la novaj lokoj niaj kunlaborantoj serioze penadas por krei pli fortan lab. esp. grupon. Ni ne povas ne mencii tiujn K-dojn, kies merito estas ĉiam memorinda pro ilia insista aktiveco por krei grupojn el *nenio*, en Montreal: K-doj Reingruber k Lazurka, en Toronto: K-do Gumbinger, en Ĉikago: K-doj Guderna k Vajner, en Cleveland: K-do Faltus, en Detroit: K-doj Tate, Ferene k Weil, k.a.

Ekde aŭtuno laŭ jam preta plano nia LEA funkcios ĉie, kie ni havas k havos grupon aŭ reprezantanton. La enmigrinta proleto en Ameriko estas alproksimiĝebla plej ofte nur per sia gepatra lingvo. Ĝis nun ni sukcese povis tuŝi precipe la hungaran, rumanan, kroatan, germanan, ukrainan, slovakan k.a. kampojn lingvajn krom la angla. Kelkajn aliajn kampojn ni nur malfacilege povas tuŝi, ĉar en tiuj lingvaj kampoj ni tute ne havas pionirojn. Tamen ni volas esti pretaj k provizos nian libro-fakon per kvanto da lernolibroj en ĉiuj naciaj lingvoj. La ĝisnuna manko de propaganda materialo k de lernolibroj ankaŭ estis serioza malhelpo al nia progreso. Por doni ekzemplon ni citas Montrealan aferon. Informo venis al nia Centro, ke en Montreal 30 ukrainaj gelaboristoj sub gvidado de K-do Reingruber formis klason. La angla scio de la ukrainoj estis treege limigita, k same K-do R. nenion sciis ukraine. La por kurso uzata PETRO ne sufiĉis, k oni postulis esp. lernolibron en ukraina lingvo. „Sendu tuj esp. lernolibrojn por ukrainoj“ oni postulis de ni. Ni ne havis ilin, skribis tuj al Moskvo, Kiev, Leningrad, Ĥarkov, Berlin; k fine post 3–4 monatoj alvenis 20 lernolibroj el Ĥarkov... sed jam tre malfrue. El aliaj lokoj oni eĉ ne respondis al nia mendo, kvankam ni promesis TUJAN pagon. La klaso de la ukrainoj preskaŭ tute disfalis, antaŭ ol la necesaj libroj alvenis. Preskaŭ la samo okazis al nia slovaka klaso en Ĉikago. En N. A. vivas milionoj da homoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Tial ni deziras esti en kontakto kun ĉiu alilanda lab. esp. organizo; ni devas scii, kiujn lernolibrojn oni uzas por laboristoj. Ni volas provizi nian librofakon per ĉiuj lerna, propaganda k gazeta eldonaĵoj de la alilandaj fratsocietoj. Ni alvokas ankaŭ tiujn N.A.-ajn Gek-dojn, kiuj ĝis nun estis hezitemaj por aliĝi al nia LEA-NA. Kiu ne ankoraŭ ricevis ian informon de nia LEA-NA centro pri la fondiĝo, petu sciigon, k ni sendos kompletan informon, aliĝilon k provizoran regularon.

Adreso: LABORISTA ESPERANTO ASOCIO de NORDA AMERIKO P.O. Box: 101, STATION „K“. NEW YORK CITY, USONO. *SAT 29.*

Komuniko de la Nederlanda LEA

Sekr. Mercatorstraat 133 AMSTERDAM.-W

Montriĝis, ke lastatempe la Federacio de laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo progresas. Antaŭ nelonge ĝi enskribis sian 2000an membron.

Por la unua de majo ĝi eldonis specialan, por tiu okazo pligrandigitan n-on de *Laborista Esperantisto*, kiu enhavis poresp-ajn artikolojn de diversaj gvidantoj el la laborista movado nederlanda.

Ni sukcese petis subtenan membrecon de diversaj sindikatoj k inter ili estas la N. V. V., kiu estas la ligo por la nederlandaj sindikatoj.

En kunlaboro kun la aliaj Ned. esp. organizoj estis eldonata ned-lingva broŝuro „Esperanto en la lernejon“ k nia Federacio sukcesis vendi 2500 ekzemplerojn en 4 semajnoj.

Antaŭ nelonge aperis holanda traduko de la broŝuro de K-do Lanti „La Laborista Esperantismo“, kiun tradukis K-doj Faŭlhaber k de Bruin. La unua eldonkvanto estas 3000 k ĝi kostas $0{,}17^1/_2$ gld., estas 40-paĝa k enhavas tutpaĝan anoncon por SAT.

Nia unua radio-kurso poresp-a, en kiu partoprenis 650 gelernantoj, finiĝis, k la necesaj preparoj por la nova kurso jam estas farataj.

La Federacio baldaŭ aperigos lernolibron, ĉar ĝis nun mankas en la nederlanda esp. libraro laborist-tendenca esp. lernolibro k ne laste pro tio, ke la nederlandaj librejoj rifuzis liveri al nia Libro-Servo lernolibrojn kun la kutima rabato.

Ĝi ankaŭ eldonas skriban kurson, sub la gvidado de K-do Faŭlhaber, por kursgvidantoj, ĉar nun jam montriĝis, ke al ni mankas sufiĉa nombro da ili k ni atendos pli grandan nombron da lernantoj en la venonta vintro. Ĝi enhavas ĉion, kion kursgvidanto bezonas scii. *W. P.*

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Francio. *Lyon.* Por la memorfesto de l' 20-jara fondiĝo de la loka lab. esp. grupo (3. VI.) K-doj k grupoj el multaj landoj alsendis salutleterojn kun bondeziroj. Multnombra ĉeestantaro plenigis la laborborsan salonegon. K-do Ru (Roux) paroladis, vive aplaŭdate, pri la laboro farita dum 20 jaroj de la vivkapabla k agema grupo. – Germanio. La 17. julio okazis la dua renkontiĝo ĉi-jara de SAT- k SEA-K-doj el la Rejn-Majnregiono en naturamika domo apud Wildsachsen (Taunus). Partoprenis sveda infangrupo kun gvidantaj Gek-doj Karlson el Stokholmo (kiuj dum 14 tagoj estis gastoj de la fervojista esp. grupo Frankfurt-Nied). La vizito estis bona pro samtempa naturamika festo k ni povis propagandi per publikaj prezentoj. Frankfurtaj k svedaj infanoj kantis komune esp-lingve. K-do Karlson vekis per sia parolado intereson ĉe naturamikoj k esp-istoj. En aparta SAT-kunsido oni priparolis la proponojn por la Ŝtutg. kongreso, precipe projekton pri pli intima interligo de SAT kun LEA-organizoj sen gravaj struktur-ŝanĝoj. (Bös, 308). – *Wiesbaden.* Niaj SEA-grupo k SAT-anoj havis la feliĉon ricevi viziton de sveda infangrupo, kies anoj estis kiel gastoj en Frankfurto. Al ili tre plaĉis la mondfama ban- k ĝardenurbo, k ili certe ne forgesos la horojn ĉi tie travivitajn. La grupo nun aranĝos varbvesperon finseptembre kun ekspozicio, por kiu materialo ankoraŭ estas bezonata. – Post la SAT-Kongr. vizitis nin 32 Gek-doj el Holando, hejmenveturantaj per aŭtobuso. Kun granda ĝojo ni pensinterŝanĝis kun ili. Ni SAT- k SEA-anoj ankaŭ vizitis la internacian esp. kunvenon en Heidelberg. – *Th. Dorn.*

EKSTER NIA MOVADO

La 24-a Universala Esp.-Kongreso en *Parizo* (31. 7.–5. 8.) estis sufiĉe grava sukceso por la neŭtralaj esperantistoj. Ĉeestis pli ol 1500 personoj. Honorpezidis la malferman kunvenon reprezentanto de la prezidanto de la franca respubliko; efektive prezidis la eksprezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro. Ĉe stacidomoj Parizaj oni vidis esp-lingvajn atentigilojn. La prezento de l'teatraĵo „Knock" de Julio Romen (Romains) en esp-o, kiun ĉeestis la konata aŭtoro mem, rikoltis grandan aplaŭdon.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

De „Ekrelo", Leipzig:

M. Ljubin: **Ruĝa Aŭroro.** 2-a eldono. 32 pĝ. Form. 10,5 × 14. Prezo: 0.25 mk.g.

Disvendo de l'unua eldono pruvas, ke estas ŝatataj tiuj originalaj versoj dediĉitaj al la viktimoj de l'klasbatalo. Ljubin havas poetan talenton, kiun li metas en la servon de la proletaro.

J. Flamo: La Maja Festo, Rakontoj. 46 pg. Form. 10 × 14. Prezo: 0.20 mk.g.

La literatura valoro de tiuj rakontoj plenaj de batalkrioj k revoluciaj signaldiroj estas preskaŭ nula. Stilo k lingvo montras seriozajn mankojn. Pri la uzo de „igi" k iĝi" la aŭtoro ofte eraras, same kiel pri kelkaj aliaj gramatikaj formoj.

S. Bezborodov: Pro kio Johann Liebhardt estis premiita je ordeno de Lenin. Elrusigis F. Robiĉek. 32 pĝ. Form. 12 × 16,5. Prezo: 0.45 mk.g.

Longa titolo por tiu mallonga rakonto, per kiu ni konatiĝas kun germano, kiu laboras kiel specialisto en la karbobaseno sovetia k kies plej alta aspiro estas fariĝi membro de la sovetia kompartio. Kalinin fine premias lin per ordeno de Lenin k krome li ricevas monpremion sufiĉe atentindan.

Rampo Edogaŭa: Ora Masko. Trad. *J. Ŝimomura.* Eld. Japana Esperanto-Asocio, Tokio. 1931. – 110 pĝ. Form. 12,5 × 18. Bindita. Prezo ne indikita.

Bele prezentita kun plaĉa bindaĵo estas tiu ĉi unua volumo de duvoluma detektivromano. Kiu ŝatas tiun specon de nervotiklaj legaĵoj, trovos sendube kontentigon, k lia sensaciemo igos nur bedaŭri lin, ke ne ankoraŭ eldoniĝis la dua parto. Konscia laboristo vane serĉas en tia „distra" legaĵo ian socian fundon. *N. B.*

Universala Esperanto-Asocio: La Servaro. 1932. UEA, 1, Tour de l' Ile, Genéve, Svisio. 96 pĝ. Form. 11×16. Prezo ne indikita.

Libreto, kiu propagandas por la servaro de UEA k informas krome pri multaj detaloj el la tuta esp. movado, ĉefe de reklama, komerca vidpunkto. Ankaŭ pri „S-uio" troviĝas reklamo; same enestas la katalogo de la SAT-libraro.

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

L'Etincelle, Bruselo, n-o 10, lerneja batalo en Hol.; *De Vrije Socialist,* Zandvoort, 3. 7., El Latvio.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Volksztg., Innsbruck, 16. 7.; Münchener Post, 26. 7.; Schwäb. Tagwacht, Stuttg., 6.–11. aŭg. (ĉiutage), Arb. Tribüne, Stuttg., aŭg.; Der Funke, Berlin, 6. 8., 1. 9.

*

Suomen Socialdemokraati, Helsinki, 26. 6., enhavis grandan rubr. en esp-o (eĉ la lastajn novaĵojn en esp-o), okaze de la junsocialista kunveno.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. – Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

BRITIO

Adresŝanĝo. – K-do Horace Walker (6255), loĝas nun: 10 Miles Hill Crescent, Chapel-Allerton, *Leeds.*

FRANCIO

K-do Aloyse Knaub, 18, rue des Orfèvres, *Graffenstaden,* Bas-Rhin 25 j., meĥanik., kĉl, pri ĉ t. Resp. garant.

Proleta grupo „Paco k Frateco" organizos je 24/25. sept. dank' al la socialista urbestraro esp. Ekspozicion en „Salle de la Justice de Paix", Place de la Mairie, *Drancy.* Pri antaŭ-informado skribu al K-do R. Melo, 30, rue Chemin Vert, *Drancy.*

GERMANIO

Ekspozician materialon por varbvespero okazonta finseptembre elpetas SEA-grupo Wiesbaden, adr.: *Theod. Dorn,* Jahnstr. 24, *Wiesbaden.* Rekompence ni sendos esp-lingvan gvidilon tra Wiesbaden.

K-do Erich Scherf, Demmeringstr. 17/II. m., *Leipzig, W 33,* kun Gek-doj el ĉl., pri ĉ. temoj.

20 gelernantoj (13-jaraj) serĉas individuan koresp-adon kĉl, pri div. temoj. Skribu al: K-do B. Mosebach, instruisto, Kirchstr. 13, *Riesa-Gröba a. E.*

K-do F. Ehret, Oberer Graben 11, *Münchberg* (Obfr.), dez. vigle koresp. pri seriozaj temoj.

Korespondantoj serĉataj! – Ĉiu 50-a homo el 5000 jam parolas esperanton. Skribu tuj al: K-do Maks Reichelt, *Friedland,* Bez. Breslau.

Esp. Rondo dez. kolektivan koresp-adon kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: E. Dietrich, Dippstr. 18, *Rohna/Sa.*

K-do Walter Türpe, Plantagenstr. 46, *Göppersdorf/Sa.,* kun Gek-doj, PK, PM, fotoj esp. gaz.

KANADO

K-do John Gronberg, 184 Spadina Ave., *Toronto, Ont.,* koresp. pri radio-teknikaĵoj kun radioamatoroj.

NEDERLANDO

Miaj 10 gelernantoj dez. koresp. kun Gekdoj el ĉ. l., pri ĉ. temoj. Adr.: S. Otsen, Barentszstr. 71/I, *Amsterdam, C.*

K-dino J. Hartskeerl, Corstenstr. 44, k K-do F. Strating, Varenbeokerweg 9, *Heerlen,* koresp. kun sovetiaj k. a. Gek-doj, L, PK.

Holanda esp-isto (22 j.) dez. trapasi ĉ. 2 monatojn en Anglio. Rekompence li volas gastigi anglan K-don dum sama tempo. Sendu resp. al: K-do J. v. Zuylen, Fred. Hendrikplantsoen 42, *Amsterdam (W).*

POLIO

5 lab. esp-istoj serĉas gekoresp-antojn el ĉl. Resp. garant. Skribu al: K-do Talentowski minejo „Juljus", *Kazimierz ap. Strzemieszyce.*

PORTUGALIO

K-do Raul dos Santos, R. das Amoreiras 138, porta 6 r/e, D., *Lisbono,* kĉl. Gek-doj, pri ĉ. temoj, L, PI.

K-do Pires de Matos, Agostinho, R. das Amoreiras 167, 3-o, D. *Lisbono,* kun eksterl. Gek-doj, L, PI.

K-do Mario Raposo, Beco do Funileiro, 9, *Lisbono,* kĉl. Gek-doj pri klasbatalo, L, PK, PM. Resp. garantiata.

Ekspozicio

Por aranĝota Esperanto-ekspozicio mi kolektas materialon k petas ĉiulandajn Gekamaradojn pri bonvola alsendo.

Nils Svensson, Österlanggatan 106 Boras (Svedio)

La Memoron PLIFORTIGAS k PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio Prof. de mnemoniko D. FAJNŜTEJN-VILNO, Zawalna 15 (Pollando).

Dank' al mia metodo, bazita sur leĝoj de **psikologio, fiziologio, logiko k pedagogio,** la **MEMORO restariĝas** ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, **pliboniĝas** ĉe tiuj, kiuj havas malbonan k **perfektiĝas** ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe **foriĝas la DISTRECO k maldiligento, fortiĝas la VOLO k pliboniĝas ĉiuj psikaj kapabloj** ĉe personoj ĉiuaĝaj.

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en esperanto.

6700 Esperanto-instruistoj!

POR VIAJ INTERESOJ

aperas **Internacia Pedagogia Revuo** jam en la 10-a jaro (1922–26 sub la titolo „Novaj Tempoj", depost 1927 sub la nuna nomo)

servas al la internacia instruistaro kiel informejo, diskutejo k lingva perfektigilo por la esp.-instruisto k kiel propagandilo inter la neesp-ista instruistaro.

Tutjara abono: 1 usona dolaro, duonjara provabono: .0,5 dol. Specimenan numeron kontraŭ 2 respondkuponoj ĉe la

Administracio: K. Hofmann, Felgenhauerstr. 63, RIESA/Elbe, Germanujo. Poŝtĉeka konto: Dresden n-o 26 379.

ENHAVO

pâĝo

Antaŭen 229
En okazo de nova mondmilito . . 230
Polio en la krizo 230/236
Protokolaro 231–235
Tra Esperantio 237

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)